Kamin R-S-

Driemaandelijks tijdschrift — Afgiftekantoor: Antwerpen X
**Jarkolekto 21 — Trimonata**

**1/91**

# INTERNACIA PEDAGOGIA REVUO

## Organo de Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj ILEI

**Redaktisto:** István Ertl

**Teknika redaktisto:** Stefan MacGill

**Respondeca eldonanto (verantw. uitgever):** E. Symoens, Putsesteenweg 131 A, B-2920 Kalmthout

**IPR**

**Redaktejo:** Esperanto-fako, Universitato ELTE/BTK
H-1364 Budapest, Pf. 107
☎ + 36-1-1180-966/185

**Presado:** Flandra Esperanto-Ligo, Frankrijklei 140,
B-2000 Antwerpen, ☎ +32-3-234 34 00

# Enhavo


STROBL, Katalin, Apliko de la komunika metodo en la instruado de Esperanto (diplomiga disertacio en la Universitato ELTE) . . . . . 1
Indekso aŭtora por la jarkolektoj de IPR 1980-1990 (KM) . . . . . 10
Temindesko por la jarkolektoj IPR 1980-1990 (KM) . . . . . 18
KLAG, Walter, Testu vian scion pri la angla lingvo (Konferenca temo) . . 19
MacGILL, Stefan, Sed kia estas la mondo de lingvoj? (Konferenca temo) . 21
MacGILL, S., Demandoveke tra la Manifesto (Kadra Konferenca temo) . 23
Arbara etoso stimula por labor-kolektivo (Raporto pri la estrara kunsido - es/smg/mj) . . . . . 26
MacGILL, Stefan, Ekzamenoj atingas kvin kontinentojn – jarprotokolo . 29
Niaj sekcioj kaj membroj aktivas (smg) . . . . . 33
Fondaĵo Szerdahelyi (ba) . . . . . 36



**ESTRARO DE LA LIGO**

**Prezidanto** : Edward Symoens, Putsesteenweg 131/A, B-2920 Kalmthout; telefono (03) 666.62.66 — Kunordigado, informado en pedagogiaj medioj, rilatoj kun Unesko kaj UEA.

**Vicprezidanto** : Stefan MacGill, Esö 7.III, H-1034 Budapest Internaciaj ekzamenoj kaj iliaj kursoj, statistikado de instruado, internaciaj lerniloj, lerneja projekto, IPR.

**Ĝen. Sekretario** : *Vakas — provizore la vicsekretario traktas la laboron.*

**Kasisto** : Bertil Andreasson, Södra Rörum pl. 455, S-24294 Hörby; tel. (0415)-501 52 — Financaj rilatoj kun sekcioj, konferenco, k.a.

**Vicsekretario** : Malcolm Jones, 41 Causeway, GB-SN 15 3DD Chippenham; tel. (0249) 656041 — Venonta konferenco, lernejana korespondado, unuecigo de naciaj ekzamen-sistemoj.

**Membroj** : Till Dahlenburg, Feldstr. 13, D-O-2722 Brüel; tel. (09-8576)-528 — Gvido de pedagogia komisiono, internaciaj ekzamenoj, metodikaj kursoj.
Zang Danchen, General Foreign Languages Dept., Huazhong Normal Univ., 430070 Wuhan, Ĉinio — Evoluo kaj fondo de sekcioj en Azio, Afriko kaj Latin-Ameriko.


## FRUKTO DE UNIVERSITATA LABORO

STROBL KATALIN (Hungario):

# APLIKO DE LA KOMUNIKA METODO EN LA INSTRUADO DE ESPERANTO

Budapest 1990, Eötvös Lorand Universitato
Diplomiga disertacio

**ENHAVO**


ENKONDUKO
**1. KOMUNIKA METODO**
1.1 ESENCO DE LA KOMUNIKA METODO
1.2 METODIKA KADRO
a. ANTAŬKOMUNIKAJ AKTIVECOJ (STRUKTURAJ, KVAZAŬ-KOMUNIKAJ)
b. KOMUNIKAJ AKTIVECOJ (FUNKCIAJ, SOCIAJ)
1.3 TEKSTOJ EN LA KOMUNIKADO
1.4 ROLO DE LA INSTRUISTO
1.5 ORGANIZO DE LA KLASO
1.6 PSIKOLOGIAJ FAKTOROJ (prezentita ĝis ĉi tie en la nuna IPR)

**2. KOMUNIKA ESPERANTA LERNOLIBRO**
2.1 KOMUNIKA METODO EN ESPERANTO
2.2 LA STRUKTURO DE LA LIBRO
2.3 LA ENHAVO
2.4 MODELLECIONO "80 TAGOJ ĈIRKAŬ LA MONDO"
a. PREPARAJ EKZERCOJ
b. KOMUNIKAJ EKZERCOJ
c. KONTROLAJ DEMANDOJ

**3. RIMARKOJ AL LA INSTRUISTO**
3.1 PRI LA LIBRO ĜENERALE
3.2 PROPONOJ POR LA PREPARAJ EKZERCOJ
**4. BIBLIOGRAFIO**

## ENKONDUKO

Ĉiam entuziasmigas la komencanton, kiam li rimarkas, ke jam facile kaj flue li povas uzi la cellingvon por komuniki. En kazo de naciaj lingvoj oni ĉiam konfrontas problemojn de la nereguleco. En la germana, jam ĉe la komenco, oni devas samtempe alkutimiĝi al la fiksita vortordo, al la diversaj fleksitaj formoj, ne parolante pri la 3 artikoloj. Eĉ en lingvoj, kiel la angla, kiun oni konsideras facile lernebla komence, la studentoj havas gravajn malfacilaĵojn per la prononco. Esperanto, aliflanke, ne havante malregulecon, povus ofte doni jam post la unuaj studhoroj grandan travivaĵon de sukceso. Kiel la instruisto atingas tion? Kiel organizi la kurson, plani la instrumaterialon tiel, ke la studentoj kiel eble plej baldaŭ komuniku? Baziĝante la ne antaŭ longe aperintajn komunikajn lernolibrojn (Streamline 1984, Strategies 1982, Themen 1983, Aktuelle Themen 1987, ktp.) mi konsideris en tiu-ĉi verko la eblecojn, kiel apliki la komunikan metodon en Esperanto.

La unua parto okupiĝas pri la metodika kadro de la modelo interalie pri la nova rolo de la instruisto, la tipaj komunikaj ekzercoj kaj ne lastvice pri la psikologiaj faktoroj, konsiderindaj dum la instruado.

Post la ĝenerala enkonduko en la dua ĉapitro mi prezentas la aplikeblecojn de la metodo en Esperanto, ilustrita pere de modelleciono "80 tagoj ĉirkaŭ la mondo". La lasta ĉapitro donas kelkajn praktikajn instrukciojn kaj proponojn al la instruisto, koncerne la unuopajn ekzercotipojn.

# 1. KOMUNIKA METODO

### 1.1 LA ESENCO DE LA KOMUNIKA METODO

La tendenco de la komunika metodo en la fremdlingva instruado jam aperis ekde la 1970aj jaroj. Pli kaj pli da lernolibroj celis ne nur instrui kaj ekzercigi aŭtomate la lingvajn strukturojn (gramatikajn kaj leksikajn), sed elirante el ĉiutagaj situacioj, el la natura komunikado, ili instigis la studentojn mem krei la konversacion, mem opinii pri iu temo uzante la jam disponeblajn lingvajn formojn kaj tiel iĝi aktivaj partoprenantoj de la lerna procezo.

En kio diferencas la komunika metodo de la jam konataj aŭdo-lingva aŭ situacia instrumetodoj, respektive, koncerne Esperanton, de la Ĉseh metodo, kiu ankaŭ baziĝas sur la komunikacio? Oni komunikas (parolas aŭ aŭskultas) ĝenerale en naturaj cirkonstancoj, se oni volas ekscii ion aŭ informi la aliajn. Tiam, kiam la aŭskultanto (ricevanto) jam konas la informon, la opinion de la alia, ne plu ekzistas informa manko kaj ili verŝajne ne daŭrigos la komunikadon. Tiu-ĉi fenomeno ŝajnas al ĉiuj memkomprenebla. Tamen, ofte okazas, ke dum la konversacio en la kurso ne ekestas tiu informa breĉo.



*Ekzemplo* Por ekzercigi iun gramatikan aŭ leksikan formon, la instruisto demandas ion, kio estas jam por ĉiuj konata. Tiamaniere la komunikado iĝas unuflanka kaj iom artefarita:

*Celo* : Ekzercigi la prepoziciojn
**Instruisto:** "Kie estas la tabulo ?"
**Lernanto**: "Apud la ŝranko"
**Instruisto:** "Kaj kie estas la ŝranko?"
**Lernanto**: "Antaŭ la fenestro"

Se ni nun formos tiun artefaritan dialogon tiamaniere, ke ekestu informmanko, la konversacio estos pli interesa kaj instigas la lernantojn pli aktive partopreni en ĝi.

*Celo* : Ekzercigi la prepoziciojn
**Instruisto:** "Pensu pri iu objekto en la ĉambro kaj mi provas eltrovi ĝin. Ĉu ĝi estas malantaŭ vi?"
**Lernanto**: "Jes"
**Instruisto:** "Ĉu ĝi estas apud la ŝranko?"
**Lernanto:** "Jes"
**Instruisto:** "Ĉu ĝi estas la tabulo?"
**Lernanto:** "Jes"

Ne plu la instruisto estas tiu, kiu "ĉion" scias. Nun li devas demandi por akiri la mankantan informon. Dume li ankaŭ havas la eblecon prezenti la lingvan strukturon bezonatan por demandi. Poste, kiam ili ŝanĝas rolojn, la studentoj jam ne havas malfacilaĵojn.

Komunikaj aktivecoj baziĝas sur informmanko kaj tiel volas proksimiĝi pli kaj pli al la ĉiutaga komunikado, al la realo.

Tiu-ĉi laŭ William Littlewood (1981) estas la celo de la fremdlingva instruado: "La esenca mesaĝo, do estas, ke fremd-lingva instruado devas koncerni sin kun la realeco: kun la realeco de komunikado kiel ĝi okazas ekster la klasĉambro kaj kun la realeco de lernantoj, kiel ili ekzistas en kaj ekster la klasĉambro."

### 1.2 METODIKA KADRO

Por povi komuniki flue kaj efike pri iu temo en diversaj ĉiutagaj situacioj, oni bezonas adekvatan vortprovizon kaj gramatikajn strukturojn. Kiel oni preparas la studentojn al la komunikado? Kiel oni atingas, ke la lernantoj cellingve pensu, reagu kaj aktive partoprenu dum la lingva kurso?

Littlewood (samloke) proponas la sekvan metodikan skizon:

1. Antaŭkomunikaj aktivecoj
   - strukturaj
   - kvazaŭkomunikaj

2. Komunikaj aktivecoj
   - funkciaj
   - sociaj interagoj

La aktivan komunikadon ĉiam antaŭas iu prepara fazo, kiam la lernantoj ekzerciĝas al la gramatikajn strukturojn, lernas aŭ refreŝigas la bezonotajn vortojn. Preparaj aktivecoj tiel ekipas la kursanojn per la lingvaj formoj uzeblaj en la komunika fazo sen postuli, ke ili vere konversaciu. Tamen, ĉar tiu-ĉi metodo emfazas la komunikan karakteron de la lingvo la preparaj taskoj helpas kontakti la strukturon al la enhavo.

### 1.2.a ANTAŬKOMUNIKAJ AKTIVECOJ

Multaj komunikaj lernolibroj eliras el tradiciaj ekzercotipoj, kiuj ofte similas al la aŭdo-lingvaj "driloj" de la 1960aj jaroj. Ili estas tutaŭtomataj strukturŝanĝoj, kiam oni ofte eĉ ne bezonas kompreni la enhavon por solvi la taskon. Ekzemplo:

*Celo* : Ekzercigi la akuzativon

*Tasko* : Respondu la demandojn! Uzu la donitajn vortojn ! *Ekzerco*: "Kien vi iros morgaŭ? Kie vi estas nun?

1. kinejo
2. teatro
3. lernejo
4. banejo
5. banko

Multaj instruistoj eskludas tiutipan ekzercadon. Tamen, tiuj taskoj povas esti utilaj, precipe se la instruisto volas fokusi al la struktura sistemo de la lingvo. Multe ekzercite, la plej gravaj gramatikaj elementoj fiksiĝas en la konscio kaj ebligas la lernantojn malpli koncentri al ili dum la komunikado.

Por pluen iri kaj pli alproksimigi la komunikadon oni povas prezenti la strukturŝanĝajn ekzercojn en situacio kaj apliki dum la aktiveco komunikajn esprimojn. Multaj lernolibroj uzas tabelojn por prezenti kelkajn variantojn. Tiujn ekzercojn Littlewood (samloke) nomas *antaŭkomunikaj ekzercoj.*

*Ekzemplo: Situacio:* Edzino volas iri amuziĝi, sed la edzo ŝatus resti hejme.

**Lernanto 1:** Vi estos la edzino. Proponu, kien iri vespere!
**Lernanto 2:** Vi estos la edzo. Vi ne volas akcepti la proponon.



| *EDZINO* | *EDZO* | |
|---|---|---|
| Ĉu ni iru | Mi preferus | 1. kinejo |
| vi satus iri | pli ŝatus resti | 2. teatro |
| vi ne volas | devus hejme | 3. lernejo |
| vi havas tempon | | 4. banejo |
| | | 5. banko |

Ĝis nun la plej grave estis, ke la studentoj ĝuste kaj senerare parolu uzante la antaŭ donitajn vortojn kaj strukturojn. Ili pli fokusis al la ĝusteco ol al la krea kaj fluа lingvouzo. Nun oni povas daŭrigi per pli konversaciaj, pli kompleksaj, taskoj. Elirante el la sama situacio la edzo havus la eblecon laŭdezire respondi. Reagi jese, aŭ nee, sed mem elekti la lingvoformojn. Ekzemplo:

*Tasko*: **Lernanto 1:** Proponu kien iri vespere!
**Lernanto 2:** Reagu al la propono jese +
nee -
Donu la kialojn!

1. kinejo +

"Ĉu vi ŝatus iri en kinejon?"
"Jes, ...."

2. teatro -
3. lernejo -
4. banejo +
5. banko -

En para ekzercado la instruisto povas doni skizon al la partoprenantoj kaj peti ilin prezenti la dialogon laŭ la ŝlosilvortoj. Tiuj dialogoj, kiam la partneroj ricevas ordonojn Brumfit nomas direktitaj dialogoj.

| **A** | | **B** | |
|---|---|---|---|
| Vi renkontas B surstrate | | Vi renkontas A surstrate | |
| **A:** | Salutu B! | **A:** | |
| **B:** | | **B:** | Salutu A! |
| **A:** | Demandu kien B iras! | **A:** | |
| **B:** | | **B:** | Diru kion vi faras! |
| **A:** | Invitu B en kinejon! | **A:** | |
| **B:** | | **B:** | Invitu A en teatron! |
| **A:** | Akceptu la proponon! | **A:** | |

Se nur unu de la partoprenantoj havas la skizon la alia devas respondi kaj reagi al neatenditaj frazoj kiel kutime en ĉiutaga vivo, oni jam parolas pri komunika aktiveco.

### 1.2.b KOMUNIKAJ AKTIVECOJ

Ne ekzistas klara dividlinio inter la antaŭkomunika kaj la komunika fazo. Jam la laste prezentita direktita dialogo postulas iomgradan liberan lingvouzon. Ĉu oni parolas pri antaŭkomunika aŭ komunika aktiveco ĉiam dependas de tio kio estas emfazata. Dum la unua fazo gravas la ĝusteco dum la alia la komunika kapablo. La komunikaj aktivecoj instigas la studentojn tiom efike kiel eble, esprimi sian intencon. Por akiri tiun celon, oni kelkfoje oferas la ĝustecon. (Por aĉeti trajnbiletojn la plej grave estas, ke la giĉetisto komprenu, kion la pasaĝero volas, senrigarde al la gramatika korekteco.)

Pri la du terminoj, la flueco kaj la ĝusteco en la lingvo instruado vidu pli detale ĉe Brumfit (1984). Littlewood (samloke) distingas du ĉefajn tipojn de la komunikaj aktivecoj.

La *funkciaj ekzercoj* havas praktikan celon: La lernanto povu solvi pere de la komunikado diversajn taskojn. Ekzercoj, prezentita en luda formo pli aktivigas la partoprenantojn. La libro de Maria Matheidesz (1987) kolektas tiutipajn taskojn. Oni trovas la unuopajn ludojn ordigitajn laŭ la temo kaj la celo de la aktiveco:

Ofte estas *unu* partoprenanto, kiu posedas la informon kaj la alia devas eltrovi ĝin. *Ekzemplo* Unu el la partoprenantoj devas priskribi la detalojn de iu bildo, kiun la alia desegnos. Tiu paro gajnas, kiu la plej fidele reproduktos la bildon fine.

Kelkfoje oni bezonas *duope* labori por solvi la taskon.

*Ekzemplo* Ambaŭ partoprenantoj havas horaron, sed malsimilajn. Unu el ili ricevas horaron, kiu enhavas la trajnojn de A ĝis B, la alia de B ĝis C. Ili devas kune trovi la plej rapidan vojon de A ĝis C, sen rigardante la horaron unu de la alia.

Pli alta nivelo estas, kiam la tuta grupo diskutas pri la problemo donita. Ili devas trovi argumentojn por aŭ kontraŭ ĝi kaj kune trovi la solvon.

*Ekzemplo* La grupo iras por tritaga vojaĝo kaj ili devas kune decidi el iu listo, kion kunporti. Oni ne rajtas elekti pli ol 6 objektojn.

En *sociaj interagoj*, aliflanke, la lernanto ankaŭ konsideras la socian medion kaj devas elekti la plej akcepteblajn esprimojn, konvenajn al la cirkonstancoj.

En la naciaj lingvoj diversgrade, sed tamen ekzistas ĝentilecformoj, kiujn oni ne povas eviti dum la komunikado. La nombro de tiuj formoj varias laŭ nacioj: En lingvoj, kiel la angla simpligas la problemon, ke oni ne uzas la "viadon". En aliaj, kiel la hungara kaj la germana eĉ gepatralingvanoj havas malfacilaĵojn decidi, kiun alparolformon uzi. Sed ankaŭ en Esperanto oni ofte alfrontas problemojn koncerne la elekton de certaj lingvaj esprimoj aŭ alparolformoj. Tielnomataj sociaj interagaj ekzercoj ebligas la lernantojn



praktiki la socian konduton en ĉiutagaj situacioj. Post la rolludo la studentoj ofte havas la taskon, rakonti la okazaĵojn el diversaj vidpunktoj.

### 1.3 TEKSTOJ EN LA KOMUNIKADO

La plej multo de homoj pasigas pli da tempo, aŭskulti aŭ legi fremdlingvajn tekstojn ol paroli mem la lingvon. Multfoje esencas, ke oni povu interpreti legitan aŭ aŭditan mesaĝon por solvi iun taskon. Ankaŭ se oni ne ĉiujn vortojn komprenas, ofte devas ekstrakti el la teksto la esencon, por informi la alian. Kiel oni evoluigas tiujn kapablojn dum la komunika fazo ? Kiel oni povas utiligi legaĵojn aŭ aŭditan materialon en la komunika instrumetodo?

Aŭdita aŭ legita informo ofte donas la bazon de iu diskuto aŭ rolludo. L.G. Alexander (1971) prezentas kelkajn ideojn koncerne la rolon de tekstoj dum la komuniko.

Kiel prepara fazo, la studentoj aŭskultas aŭ legas iun tekston kaj poste respondas demandojn de la instruisto. Dum la aŭskultado kaj la legado oni postulas de ili, ekstrakti la plej gravajn informojn. Se unue la lernantoj aŭskultas, ili ankaŭ havas la eblecon aŭdi la ĝustan prononcon, la ĝustan intonacion.


Kiel sekva paso, surbaze de la ekstraktita informo, oni povas organizi rolludon aŭ diskuton, depende de la teksto. Se temas pri iu rakonto aŭ konversacio la instruisto ne bezonas finlegi aŭ finaŭskultigi la materialon kaj povas doni al la studentoj la eblecon, mem krei la daŭrigon.

Finfine, kiel denove kontrola ekzerco estas la lernantoj kiuj laŭtlegas la tekston reproduktas la aŭditan materialon, aŭ resumas la diskutpunktojn.

Kiam la lernantoj mem inter ili konversacias, ili plej verŝajne uzas simpligitan, parafrazitan lingvon. Ili alkutimiĝas al la malrapida, korekta parolo de la instruisto. Sonmaterialoj ebligas ilin aŭdi aliajn parolmanierojn. Interese, ke la novaj komunikaj lernolibroj, ekzemple Themen (1983) eĉ paroligas homojn kun forta akcento aŭ eĉ kun malbona prononco kaj tiamaniere alkutimigas la gelernantojn al normalaj ĉiutagaj situacioj, kiam oni ofte aŭdas kaj devas kompreni malĝustan nekutiman parolon.

### 1.4 ROLO DE LA INSTRUISTO

Dum la transiro al la komunika fazo, tiu kontrolo daŭre malpliiĝas kaj la aktivecoj estos regataj tute de la kreiveco de studentoj. Oni povus prezenti la sekvan diagramon de Littlewood:



La komunikaj aktivecoj ŝanĝas la rolon de la instruisto. Antaŭkomunikaj ekzercoj postulis ĉiaman korektadon kaj kontrolon. Komunikaj taskoj ne bezonas tiutipan kontrolon. Se la instruisto interrompas, li ofte eĉ malhelpas la fluecon de la parolo, ĉar la studentoj konstante timas, ke ili estos korektataj. Por akiri la fluecon kaj pli grandan sendependecon de la studentoj, la instruisto stimulos la aktivecon (kreas la situacion por la rolludo aŭ donas la temon de la diskuto) sed lasas la studentojn libere komuniki.

Kelkfoje li estas la helpanto, kiu donas konsilojn por progresigi la komunikadon. Li eĉ povas partopreni kiel kun-komunikanto. Tiu rolo ebligas al li prezenti novajn lingvoelementojn, sen esti la gvidanto en la konversacio. Alifoje la instruisto pasive aŭskultas kaj notas la plej oftajn, tipajn erarojn, kiujn li korektas poste.

### 1.5 ORGANIZO DE LA KLASO

Grupaj kaj paraj aktivecoj karakterizas la komunikan metodon. La instruisto estas tiu, kiu devas decidi la plej taŭgajn organizadon de la klaso por la unuopaj ekzercoj. Ĉar tiu-ĉi grupigo estas nekutima, estus grave organizi paran kaj grupan laboron jam ekde la komenco, kaj tiel alkutimigi la lernantojn al la nova metodo. Tiamaniere la komuniko iĝas pli natura kaj pli similas al ĉiutagaj konversacioj. Para laboro havas ankaŭ la avantaĝon, ke la lernantoj pli multe parolas dum la kurso ol kutime.

Oni povus argumenti, ke dum la grupaj kaj paraj aktivecoj la instruisto ne havas la eblecon aŭskulti ĉiujn samtempe kaj korekti la bazajn erarojn. Ĝuste por tio, en multaj lernolibroj la komunikan fazon ĉiam sekvas denove la kontrolita, kiam oni havas la eblecon, trairi la plej gravajn punktojn. Analizante la metodikan strukturon de la modernaj komunikaj lernolibroj, oni trovas ke, kelkfoje la vicordo estas inversa. La instruisto povas komenci iun lecionon per komunikado, kiel ekzemple per rolludoj. Dum la ekzercado li diagnozas la malfacilaĵojn koncerne la specialan komunikan funkcion. Baziĝante sur tiu diagnozo, la instruisto organizas kontrolitan praktikadon, kiu ebligos la lernantojn pli korekte kaj efike paroli. Tiun fazon denove sekvas la komunika, kiam la lernantoj utiligas la ekzercitan materialon.

Tiu metodo tre utilas al la mezgraduloj aŭ progresantoj, malkovrinte la plej gravajn mankojn en ilia lingvouzo.

### 1.6 PSIKOLOGIAJ FAKTOROJ

Komunikaj aktivecoj antaŭkondiĉas certagradan imagkapablon de la studentoj. Ili ofte devas sin esprimi en situacioj, formi mem sian opinion pri la diversaj argumentpunktoj aŭ eĉ improvizi en rolludoj. Por la plej multo de la kursanoj tiuj-ĉi taskoj estas iomgrade novaj. Tradiciaj instrumetodoj jam dekutimigis la lernantojn de tiutipaj aktivecoj. La instruisto demandas, la studentoj obeas rektajn ordonojn. Por fari tion, por doni ĝustan respondon ili ne nepre bezonas sin mem esprimi aŭ esti kreivaj. La malbona influo de tradiciaj instrumetodoj videbligas, kiam oni komparas infanojn kun plenkreskuloj. La infanoj ofte estas pli imagemaj, pli kreivaj povas pli identiĝi kun la speciala rolo, ili devas ludi. Kaj tiu imagemo ne nur rezultas de la fakto, ke ili havas malpli da inhibicioj, sed ankaŭ ke la plenkreskuloj ne kutimiĝis al improvizo, al sin esprimo. Dum la studjaroj ili ofte, pli malpli, perdis tiun kapablon. Estas la tasko de la instruisto, ripari tiun mankon kaj enmeti multe da komunikaj aktivecoj en la studmaterialon.

Rolludi kaj improvizi ne estas facilaj taskoj por personoj, kiuj timas paroli aŭ havas inhibiciojn kontraŭ granda publiko. Estas ĉiam malfacile por la instruisto, decidi kiel solvi tiun problemon.

Por atingi bonan etoson, bezonotan en komunikaj ekzercoj, kaj por malstreĉigi la homojn, oni ofte komencas per ludoj, kiuj ebligas la lernantojn sen inhibicioj sin esprimi. En la elekto de la partoprenantoj aŭ roluloj, la instruisto ĉiam devas konsideri la personecon de la lernanto kaj devas doni al li la plej konvenan rolon. Tiu-ĉi tasko postulas de la gvidanto bonan homkonon, ĉar liaj psikologiaj kapabloj povas esti decidaj en la elformiĝo de la etoso dum kurso.

Por alkutimigi la studentojn al flua parolo, oni multfoje organizas paran laboron. Duope, ili pli kuraĝas paroli, sciante, ke ne la tuta klaso aŭskultas. Paraj kaj grupaj ekzercoj ofte kreas familian atmosferon kaj agrablan etoson, kiu estas la bazo por la natura komunikado.

*Daŭrigota en estontaj numeroj de IPR*

## La socipolitika kaj pedagogia kaj kultura valoroj de Esperanto

Ĉi tiu baza informa verko de Edward Symoens estas havebla en kvar lingvoj: Esperanto, la angla, franca kaj nederlanda. Ĝi prezentas koncize la celojn kaj strukturojn de la lingvo, kaj poste listigas argumentojn pri ĝia pedagogia valoro kaj kultura rolo. Unu sekcio resumas la ĝisnunajn eksperimentojn pri la efikeco de Esperanto-instruado kaj la influo sur lernado de naciaj lingvoj. Fine ĝi prezentas resumon pri la nuna stato de la instruado.

La kvardek-paĝa verko aperis en Esperanto kadre de la serio 'Esperanto-Dokumentoj' de UEA sub numero 23E. La anglan kaj francan versiojn eldonis ILEI kaj la nederlandan FEL. Mendu ĉe UEA, Nieuwe Binnenweg 176, 3015 BJ Rotterdam, Nederlando aŭ Flandra Esperanto-Ligo (FEL), Frankrijklei 140, B-2000 Antwerpen, Belgio. Esperante: 3 gld. kun triona rabato ekde 3 ekzempleroj ĉe UEA / 57 BEF kun rabato de 10% ekde 3 ekz. ĉe FEL. Angle, france: Prezo ĉe UEA fiksota / 145 BEF ĉe FEL kun triona rabato ekde 3 ekz. Nederlande: 5,40 gld. kun sesona rabato ekde 3 ekz. ĉe UEA / 100 BEF ĉe FEL kun triona rabato ekde 3 ekz. Sendokostoj aldoniĝas ĉiukaze.

# Indekso por la jarkolektoj de IPR 1980–1990


1. Akademio: Oficiala komuniko 81/1. p.16.
2. Akademio: Oficialaj informoj 83/3. p.72.
3. Andreasson, Bertil: Propono de estrarano pri financaj aferoj 83/3. p.71.
4. Andreasson, Bertil: Ekonomia raporto 87/2-3. p.63–65.
5. Andreasson, Bertil: Alloga loko de nia 19-a konferenco 84/3. p.62–64.
6. Árvay, Sándor: Nigra tabulo 87/2-3. p.16–21.
7. Bacev, Marin: Rezultoj de la laborgrupo de la 16a ILEI-konferenco 83/1. p.9–10.
8. Bacev, Marin: Fakultativa fremdlingva instruado en Bulgario 83/2. p.45–47.
9. Balbin, Julius: Loglan 80/2. p.36.
10. Balogh, Viktória: Rilato inter la matematika pensmaniero kaj Esperanto-instruado 88/2. p.1–15. 88/3. p.1–2.
11. Barcsay, Zsuzsa: Alvoko 80/1. p.23.
12. Barcsay, Zsuzsa: Tradiciaj kaj modernaj instrumetodoj de la Esperanto-instruado (Raporto pri la 22-a konferenco de ILEI) 88/3. p.20–21.
13. Barcsay, Zs.: Recenzo pri Widerberg La knabino kiu ne volis iri al la infanejo 90/1. p.13.
14. Barcsay, Zsuzsa: Motivado per ekzamenoj en lerneja Esperanto-instruado en Hungario 90/2. p.1–5.
15. Barcsay, Zsuzsa: Sceno kun ĉefa rolulo en la fono 90/3. p.26.
16. Barcsay, Zsuzsa: 8-a Internacia Metodika Seminario 90/4. p.4–7.
17. Barcsay, Zsuzsa – Behrmann, Hermann: 2-a Tago de la Lernejo en la 68-a UK en Budapeŝto 84/1. p.9–11.
18. Behrmann, Hermann: La kohera strukturo de la Esperanto-gramatiko kaj minimala vorttrezoro por la lingvo-orientiga instruado 80/2. p.38.
19. Bennemann, Paul: El la ,,Tra la mondo'' 83/1. p.4–8.
20. Bergamaschi, Aldo v. Formizzi, G.
21. Blázques, Félix García: Problemoj ĉe la klasifiko de verboj 82/2. p. 35–44.
22. Blázquez, Félix García: La sufikso -iĝ- ĉe apliko al verboj 89/2. p.15–21.
23. Bokarev, E.A.: Fonemo kaj sono en Esperanto 84/1. p.5–6.
24. Bormann, Werner: La reala evoluo de la vorttrezoro en planlingvo 84/1. p.18–22.
25. D'Addio, Wanda – Bertoni, Giuliana: La problemo de fremda lingvo en elementaj lernejoj 85/2. p. 29–34.
26. Childs-Mee, Audrey: Recenzo pri Espolezn 1 de Lez Peranto 89/1. p.23–24.
27. Csiszár, Ernő: Antinomio de lerneja lingvaĵo al la aplikebla 88/4. p.11–17.
28. Dahlenburg, Till: Ĉu belarta verko apartenas al instruhelpiloj? 87/2-3. p.29–33.
29. Dahlenburg, Till: Internaciismoj: ĉu helpo, baro aŭ rezerva fonto en la lernado de Esperanto? 88/1. p.23–31.
30. Dahlenburg, Till: La motivado de la instruisto 89/3. p.1–6.
31. Danchen, Zang: Instru-programo de Esperanto por ĉinaj altlernejoj 89/2. p.22.
32. Dasgupto, Probal: La neintereseco de Esperanto al lingvosciencistoj 86/2. p.10–14.
33. Dazzini, Mario: Raporto pri la Simpozio de ILEI en Parizo 80/1. p.13–15.
34. Dazzini, Mario: Preparkonferenco al nova serio de kunordigaj konferencoj en Maribor 80/2. p.43–44.
35. De Araujo, Fernando Carlos: Kuritibo 90. 90/4. p.32.
36. De Cervalho, Euclydes Geraldis: ,,Ni parolu pri faktoj'' 81/1. p.20–21.
37. Deceuninck, Herman: Rezolucio de ILEI 85/1. p.9–10.
38. Demonty, Marc: Superrigardo de la instrusistemo en Belgio 86/2. p.34–37.
39. Dominte, Constantin: Rimarkoj pri la lingvaj baroj en la poezia traduko 80/2. p.36.
40. Elementa-lernejanoj ,,CEP'': Kantoj, ludoj 82/3. p.56–60.
41. Ertl, István: Recenzo pri: Ludwig-Triolle: Nouveau cours d'espéranto 88/2. p.28–31.





42. Ertl, István: Sorobano kaj koro-bano 90/2. p.13–14.
43. Fechler, Hans: Didaktikaj ludoj 82/2. p.29–34.
44. Fechler, Hans: Letero al la redaktoro 85/1. p.2–4.
45. Fiedler, Sabine: Pri karakterizaĵoj de pedagogiaj fakvortoj en Esperanto 88/3. p.3–8.
46. Fiedler, Sabine: Pri kelkaj fakvortoj el la sfero ,,Universitata medio'' 89/2. p.9–14.
47. Formaggio, Elizabetta: Lerneja eksperimento pri lernfacileco kaj transfero en la fremdlingvoinstruado 90/1. p.1–9. 48. Formizzi, Giordano – Bergamaschi, Aldo: Kia lernejo en Eŭropo? 86/1. p.16–22.
49. Gacond, Claude: Necesas fortigi la osmozon! 89/4. p.12–15.
50. Gérard, Ray: Komputiloj en instruado 86/3. p.10–22.
51. Gold, David: Studo pri ebla influo de Jida kaj Hebrea lingvoj je Esperanto 80/2. p.37.
52. Golden, Bernard: Normoj kaj celoj de la universitata instruado de Esperanto 80/1. p.3–12.
53. Golden, Bernard: Bildkarta instru-ludo 81/1. p.13–14.
54. Golden, Bernard: OEO kaj ni 81/1. p.17–19.
55. Golden, Bernard: Ĉu la akuzativa gramatikaĵo en Esperanto estas neinstruebla kaj nelernebla? 82/3. 61–63.
56. Golden, Bernard: Instruado pri bona stilo en la elementa kurso 83/3. p.67–68.
57. Golden, Bernard: Ĝustigo de vortuzado en faka artikolo pri aŭdvidaj rimedoj 84/1. p.14–17.
58. Golden, Bernard: La loko de idiomatismoj en Esperanto 85/2. p. 38–40.
59. Golden, Bernard: Kion bezonas la sciencistoj: la lingvon ,,Esperanto'' aŭ la kodon ,,Interncia Lingvo''? 85/3. p.72–74.
60. Golden, Bernard: Kiel recenzi lernolibron? 85/3. p. 75–77.
61. Golden, Bernard: Ĉu ni instruu, ke d-ro Zamenhof estis pola kuracisto? 88/2. p.16–18.
62. Golden, Bernard: Nova Esperanto-lernolibro por hungarlingvanoj 88/2. p.19–26.
63. Golden, Bernard: Instruado kaj lernado en la Strategia plano de UEA 90/3. p.8–13.
64. Gonin, Jacqueline: Pri infanlibroj en Esperanto 88/1. p.39–52. 89/1 p.23–26.
65. Gonin, Jacqueline: La ronkanta avo (recenzo) 90/3. p.24
66. Gransee, Hans: La intelekta evoluo de la infanoj 81/1. p.14–16.
67. Gruner, Horst: Gerda malaperis. Recenzo 90/4. p.19.
68. Guéguéniat, Yves: ,,Ni parolu pri faktoj'' 80/1. p.18–20.
69. Haszpra, Ottó: La stato kaj la tendencoj de la aplikado de Esperanto en la sciencoj kaj fakoj en majo 1981 81/1. p.6–14.
70. Haupenthal, Reinhard: Tezoj pri la lingva problemo 87/2-3. p.15.
71. Hoekstra, Oene: La Esplor-kreiva Vojo: Kien ĝi kondukas? 87/1. p.20–21.
72. Horst-Kolinska, Mila: Projekto produkti vid-bend-serion kun Esperanto-kurso por komencantoj 90/3. p.21–22.
73. Hurĉak, Anja: Raporto pri LOI en la baza lernejo ,,Bratstvo''
74. Iacci, Paŭlo – Tadolini, Johano: La sociigo de la dulingva infano kaj la rilatoj inter la interagado en la familia dinamiko kaj la ekstera soci-kultura medio 80/2. p.25–29.
75. Ilieva, Ana: Konsiloj el metodiko de fremdlingva instruado 83/1. p.11–15.
76. Jedinstvo en Rijeka 80/1. p.16–17.
77. Jermář, Jaromír: Etnaj problemoj kaj interlingvistiko 80/2. p.41.
78. Karamudini, Mohammad: Dek kvin jaroj da instruada progreso 89/2. p.27-28
79. Jug, Janez: Ne Sapel, sed Japelj 86/1, p.29-30
80. Kiselman, Christer O.: La problemo de duarangaj derivaĵoj 87/1. p.11–19.


**INSTRUISTOJ – IPR – VIA REVUO!**

81. Kisfaludy, Katalin: Instruado de Esperanto per parolanta komputilo 88/4. p.7–9.
82. Klag, Walter: Reformita gimnazio en Aŭstrio 89/2. p.29–
83. Klag, Walter: Gepatroj kontraŭ ,,sekskofro'' 90/2. p.9.
84. Klag, Walter: Leg-raportetoj (Aŭstralia Antologio, Überzwerch: Homoj tiaj kaj aliaj 90/2. p.16.
85. Klag, Walter: Vortoj de profesoro Th. Cart (recenzo) 90/3. p.25.
86. Klag, Walter: Nur angle parolata ĉi-tie 90/4. p.13.
87. Klemola, Irja: Gepatra lingvo, fremdaj lingvoj kaj matematiko en la studplano de deviga lernejo 80/2. p.30–31.
88. Kohei, Enrique: Unua Tut-Amerika Esperanto-kongreso 80/1. p.24.
89. Kordylewski, Leszek: Spertoj pri universitata lektorato de Esperanto 83/1. p.21–22.
90. Koutny, Ilona: La rolo de komputilo en la instruprocezo 88/4. p.1–6.
91. Koutny, Ilona — Varga-Haszonits, Zsuzsa: Diplomlaboraĵoj de la Universitato ELTE en Budapeŝto 1988-90. 90/4. p.14–18.
92. Kovács, Márta: La lastaj dek jaroj de ILEI 87/2-3. p.2–11.
93. Kovács, Márta: Kvinlanda Pedagogia-Didaktika Eksperimento 89/2. p.1–8.
94. Kovács, Márta (trad.): La fervoja linio de Flåm 90/4. p.36–37.
95. Kruco: Meditado super nia metodiko 90/2. p.10–12.
96. Larue, Bernard-Régis — Van Damme, Emile: La DLT-projekto aŭ kia maŝina tradukado helpas Esperanton anstataŭ konkurenci ĝin 87/2-3. p.34–38.
97. László, István: Ferenc, Franz aŭ François Liszt? 86/2. p.26–27.
98. Lentaigne, J.: La eraroj ... de aliaj 85/1. p.5–8.
99. Lipiĉar, Mira: Peter Zlatnar — Nekrologo 87/2-3. p.13–14.
100. Lo Jacomo, François: Libereco aŭ aŭtoritato 81/3. p.59–65.
101. Lugwig, Edmond: Recenzo pri Freinet kaj moderna edukado 89/1. p.23.
102. Ludwig, Edmond: Instruistoj pri lingvoj kaj Esperanto 90/1. p.10–11.
103. MacGill, Stefan: Instrui per aktorado 87/2-3. p.22–29.
104. MacGill, Stefan: Paroligi per rol-ludoj 88/1. p.32–38.
105. MacGill, Stefan: Celolingvaj ekzercotipoj 88/3. p.9–16.
106. MacGill, Stefan: Ni kaj la strategio 89/1. p.8–13.
107. MacGill, Stefan: Kadrotemo de la 25-a ILEI-Konferenco 90/4. p.33–35.
108. smg: ILEI/UEA ekzamenoj lanĉitaj ekster la UK 88/4. p.24–25.
109. smg: ILEI labortable 88/4. p.33–34.
110. smg-es: 23-a konferenco de ILEI 89/3. p.16–18.
111. smg: ILEI en la Universala Kongreso 89/3. p.24–28.
112. smg: Raporto de la estrar-kunsido de ILEI 90/1. p.17–21.
113. smg: Jar-raporto pri la internaciaj ekzamenoj de UEA/ILEI 90/1. p.27–32.
114. smg: Audrey C.E. Childs-Mee (1926–1990) 90/3. p.36.
115. smg: Statutpropono por nia Ligo 90/4. p.20–26.
116. smg: ILEI labortable 90/4. p.27.
117. Maddern, I.T.: El la nova koncepto pri edukado 81/1. p.3–12.
118. Maiser, Hans: Oficiala opinio de la Bavaria Kulturministro pri Esperanto 81/2. p.31–34.
119. Malovec, Miroslav: Problemoj de skribaj kursoj 90/3. p.14–16.
120. Manceau, Jacques: Ludoj por komencantoj 89/1. p.14–167
121. Marcetta, Mirko: Fonoskribo 82/2. p.47.
122. Marevic, Jozo: Modernigita lernejo postulas ankaŭ novan instruiston 83/2. p.36–44.
123. Marevic, Jozo: Teknologia prezenteco en la nuntempa lernejo 83/3. p.60–66.
124. Markheden, Malte: Ĉu ni bezonas novan sufikson? 84/1. p.23–24.
125. Martín, Andrés: Enpensiĝu, kolegoj! 83/3. p.69–70.
126. Mattusch, Hans-Jürgen: Pri projekto de internacia altlerneja Esperanto-lernolibro 88/4. p.18.
127. Maul, Stefan: Lerni per ,,Monato'' 84/3. p.57–59.
128. Medvedev, Lev: Rusa AIS Sesio 90/4. p.37–38.



129. Mee, Lawrence: Niaj lernantoj bezonas propran vortaron! 89/3. p.7–11.
130. Mee. Lawrence: Raporto pri la Interetna Vortaro de Ordinara Esperanto 90/4. p.37.
131. Menabene, Alberto: Neceso de la internacia kunlaboro interne de ,,Eŭropa Asocio de la Instruistoj'' 82/2. p.50–51.
132. Mercieca, Antony: Ĉu la mondo vere bezonas internacian lingvon? 82/3. p.69–73.
133. Merla, Maria: La plej facila lingvo — malfacile lernebla 89/4. p.16–22.
134. Nádasdy, Ádám: Tosto 87/2-3/ p.1.
135. Núñez, Antonio Alonso: Pri la artikolo de Blázquez pri ,,iĝ'' 89/3. p.12–15.
136. Núñez, Antonio Alonso: Internaciaj preuniversitataj somerkursoj en Esperanto 90/4. p.1–3.
137. Ollson, Olle: Al sekciestroj kaj membroj de ILEI 80/1. p.21.
138. Ősz, Gabriella: Lernejaj kooperativoj 87/2-3. p.51–55.

139. Pala, Nino: Raporto pri la enkonduko de Esperanto en italan elementan lernejon 81/3. p.66–73.
140. Pdensky, F.: Didaktikaj ludoj 81/3. p.81–82.
141. Pirlot, Germain: Statistiko 87/2-3. p.39–40.
142. Pirlot, Germain: Oficialaj Esperanto-kursoj je supera nivelo, en Universitatoj kaj samgradaj lernejoj 88/1. p.53–56.
143. Pitt, Arnold: Kial motivado? 88/3. p.22–23.
144. Pitt, Arnold: Paroligiloj de Stanley Nisbet (recenzo) 90/3. p.25.
145. Priotesa, Ioana: Nuntempa vidpunkto koncerne la artefaritajn lingvojn 80/2. p.35.
146. Rátkai, Árpád: Fruaj socialismaj konceptoj pri la lingva futuro de la homaro 80/2. p.40.
147. Raveloson, Eugène: Malagasio aŭ Madagaskaro 80/1. p.22.
148. Rossi, Nikolino: Kelkaj konsideroj pri avangarda literaturo en Esperanto 82/3. p.74–81.
149. Sadler, Mike: Lernu kaj instruu vivi en paco 90/2. p.30–31.
150. Sanders, Corrie: Koordinatoj 81/1. p.18–19.
151. Saxl, Margarete: La Cseh-metodo por infankursoj 90/2. p.32–33.
152. Schnell, Roland: Rimarkoj 90/3. p.6–7
153. Shao, Rong: Kial kaj kiel enkonduki en la Esperanto-kurson 90/2. p.6–
154. Shao, Rong: Pri verkadaj principoj por la Lernolibro de Esperanto en Sciencoj kaj Teknikoj 90/4. p.28–32.
155. Sirkó Ilona: Recenzo pri Kreito: Lernu kreive! 90/1. p.35
156. Smidéliusz Katalin: Kritika analizo de logika lernludo 89/4. p.25–28.
157. Sonnabend, Helmut: Malto - dua ponto al Afriko. Loko de la ĉi-jara konferenco de ILEI 80/1. p.1–2.
158. Sonnabend, Helmut: Esperanto — lerneja eksperimento 80/2. p.32–35.
159. Sonnabend, Helmut: Edukado — ĝiaj tendencoj kaj intencoj de ILEI (festparolado) 80/3. p.54–58.
160. Sonnabend, Helmut: Kelkaj interesaĵoj el la 15-a Konferenco de ILEI 81/3. p.74–76.
161. Sonnabend, Helmut: Parolado kaj prelegoj el la 16-a konferenco de ILEI en Seiano 82/3. p.64–68.
162. Sonnabend, Helmut: Kion lernas germanaj gelernantoj pri la bilanco de la dua mondmilito? 85/2. p.41–45.
163. Sonnabend, Helmut: Retrospektivo kaj nova estraro de ILEI 85/3. p.49–52.
164. Sonnabend, Helmut: English ,,yes'' — Esperanto ,,jes''. Lingvoj kiel partneroj (parolado okaze de la inaŭguro de la 19a Konferenco de ILEI) 85/3. p.64–71.
165. Sonnabend, H.: Esperanto en la sistemo de fremdlingva instruado 84/3. p.65–72.
166. Sonnabend, Helmut: Asemblea Konferenco de ILEI 84/3. p.60–61.
167. HS: La Kvara Internacia Konferenco pri adolto-edukado 85/2. p.26–28.
168. S.S.: Kion pensas s-ro Versteegh pri Esperanto? 85/2. p. 35–37.
169. Sossois, Geroges: Didaktikaj ludoj kaj ludiloj 87/2-3. p.41–50.
170. Spencer, Annie: Baza kurso de Esperanto 81/1. p.15.

171. Stern, Ellnor: Rajdado kun blinduloj kaj malfortvidantoj 83/2. p.27–33.
172. Symoens, Edward: Memore pri István Szerdahelyi 88/1. p.2.
173. Symoens, Edward: Raporto pri la ILEI-konferenco en Lodzo 88/1. p.14–20.
174. Symoens, Edward: Labolplano de ILEI (1989–91) 89/1. p.1–7.
175. Symoens, Edward: Tria Azia Konferenco de Esperanto-instruado 89/4. p.1–9.
176. Symoens, Edward: ILEI-konferenco en Hanabanilla 90/3. p.1–5.
177. es-smg: 23-a konferenco de ILEI 89/3. p.16–18.
178. Szabó, Imre: Profesoro Szerdahelyi forpasis 88/1. p.3–11.
179. Szentgyörgyi, Albert: Psalmus humanus 86/2. p.17–18.
180. Szerdahelyi, István: La historio kaj nuna stato de interlingvistika kaj esperantologia universitata instruado kaj scienca esploro en Hungario 80/2. p.38–40.
181. Szerdahelyi, István: La teorio de lingvoinstruado I. 82/1. p.3–5.
182. Szerdahelyi, István: Prolegomeno Suplemento al 86/1,2,3 87/1.
183. Szerdahelyi, István: La morgaŭo de la fremd-lingva instruado 86/2. p.1–9.
184. Szerdahelyi, István: Helmut Sonnabend 87/1. p.1–2.
185. SZ-I: Prelegvojaĝo de la prezidanto de ILEI 86/2. p.41–46.
186. sz -i: La preseja diableto serpentumas 86/1. p.27–28.
187. Tadolini, Johano v. Iacci, P.
188. Tangerud, Odd: La norvega lingvo 86/3. p.30–37.
189. Tangerud, Odd: Priparolata tempo — relativa tempo 88/4. p.19–22.
190. Tangerud, Odd: Interesa frazo en la tradukaro de Zamenhof 89/4. p.29.
191. Thune, Lis: Pri la Jubilea Jaro 84/2. p.43–45.
192. Tavĉar, Sonja: Kelkaj pensoj pri la instruado de la internacia lingvo Esperanto 82/3. p.53–56.
193. Tavĉar, Sonja: Propono... [Recenzo pri En Ten Tini] 84/2. p.47–48.
194. Tonkin, Humphrey: La rolo de Instruado en la Esperanto-Movado 85/3. p.53–63.
195. Tucker, Gerald: Recenzo pri Szanser Glotodidaktikaj kaj specifaj aspektoj de Esperanto-instruado 89/1. p.25.
196. Van Damme, Emile: Enkodigo de Esperanto 87/1. p.3–10.
197. Van Damme, Emile: Recenzo pri: Eichholz En novan mondon 88/3. p.17–19.
Van-Damme, E. v. Larue, G.
198. Varga-Haszonits, Zsuzsa — Koutny, Ilona: Diplomlaboraĵoj de la Universitato ELTE en Budapeŝto (1988-90) 90/4. p.14–18.
199. VHZS: La donaco de Loveno 86/2. p.32–34.
200. VHZS: Recenzo pri: Fernando de Diego: Nuevo método de Esperanto para classes y auodidactas 88/2. p.27–28.
201. Ligetiné-Verebély, Anna: Pledante por la sentoj 86/1. p.2–6.
202. Verheule, F.: Kelkaj notoj rilate al la instruado de Esperanto al kaj far blinduloj 83/3. p.56–59.
203. Virág, Anna: La ,,du cerboj'' de la homo 86/1. p.7–15.
204. Wald, Lucia: Rimarkoj pri la rilato inter la historio de la lingvo kaj de la socio 80/2. p.35.
205. Weilun, Li: Kion fari antaŭ diversnivelaj lernantoj? 90/1. p.11–12.
206. Zlatnar, Peter: La unua generacio de ,,oficialaj'' Esperanto-instruistoj en Jugoslavio 87/1. p.24–28.

## Nesignitaj/redakciaj verkoj

207. — Kiel lecione instrui la ĉarman poemon ,,Panjo Anas''? 80/2. p.42.
208. — Sciigoj, raportoj 80/2. p.44–46.
209. — Korespondi deziras 80/2. p.47–48.
210. — Leteroj 80/2. p.48.
211. — Kelkaj rimarkoj de la redaktoro pri tiu ĉi IPR-numero 80/3. p.49.



212. — Inaŭguro kaj kelkaj rezultoj de la 14-a konferenco en Malto: Mesaĝo de la ŝtatprezidento al la konferenco 80/3. p.51.
213. — Salutletero de Ĉina Esperanto-Ligo 80/3. p.51.
214. — Saluto de TEJO 80/3. p.51.
215. — Salutvortoj al la konferenco kaj gastoj (prezidanto) 80/3. p.52–53.
216. — Parolado de lia ekscelenco la ĉefjuĝisto profesoro J.J. Cremona okaze de la malfermo de la 14-a konferenco 80/3. p.58.
217. — Rezolucio de la 14-a konferenco 80/3. p.59.
218. — Propono de la 4-a studgrupo de 14-a ILEI-konferenco en Malto 80/3. p.61–63.
219. — Al la Eŭropa parlamento: Memorando de ILEI pri la lingvo Esperanto — ekzemplo por similaj agadoj en la mondo 80/3. p.64–65.
220. — Kiel niaj sekcioj laboras 80/3. p.66–68.
221. — Niaj legantoj opinias, raportas 80/3. p.69–72.
222. — Al la sekciestroj 81/1. p. 1–2.
223. — 15-a konferenco de ILEI 81/1. p.23–28.
224. — Kelkaj rimarkoj 81/2. p.29.
225. — Rekta laboro por infanoj (a. Internacia printempa semajno 81 en Grésillon; b. Internacia Esperanto-klubo de Amikeco (Varsovio) 81/2. p.35–43.
226. — Leteroj, opinioj 81/2. p.44–48.
227. — Statut-projekto 81/2. p.49–55.
228. — Rimarkigoj kaj indikoj 81/3. p.57–58.
229. — Statuto kaj Ĝenerala Regularo de ILEI — Proponoj, amendoj kaj korektoj 81/3. p.77–79.
230. — Anstataŭ recenzi 81/3. p.79–80.
231. — IPR informas pri la 16a konferenco de ILEI 81/3. p.83–84.
232. — Mario Dazzini: Kvindek jaroj da laboro por Esperanto 82/1. 1–2.
233. — Estraraj raportoj 81/1. p.20–24.
234. — La diroj de Mateo 82/2. p. 25–26.
235. — Ree infanoj en Grésillon. Pri la 8-a Internacia Printempa Semajno 82/2. p.27–28.
236. — 9-a Internacia Printempa Semajno en Grésillon 83/2. p.48.
237. — La batalo kontraŭ analfabeteco en Etiopio 82/2. 45–46.
238. — Rezolucio de la 7-a Nacia Kongreso de A.E.D.E. 82/2. p.48–49.
239. — 100jara datreveno de Esperanto. La kontribuoj de ILEI 82/3. p.82–83.
240. — Letero de la redaktoro al la legantoj de IPR 83/1. p.1–3.
241. — Amerika Asocio 83/1. p.16–18.
242. — Edukado. El ,,Norvega Esperantisto'' 83/1. p.19–20.
243. — Etnaj lingvoj en Eŭropo kaj Esperanto 83/2. p.25–26.
244. — Internacia Lernejo en 1987. 83/2. p.34–35.
245. — Internacia Lerneja Semajno en 1986 aŭ 1987 83/3. p.52–55.
246. — La XVIII-a Konferenco de ILEI 83/3. p.49–51.
247. — Letero de la Ĝenerala Sekretario de ... al la Infanoj de la Mondo 84/1. p.1–2.
248. — Iom pri Ŝkofja Loka, loko de nia 18-a konferenco 84/1. p.3–4.
249. — Survoje al Internacia Lerneja Semajno aŭtune 1986. 84/2. p.25–26.
250. — Esperanto-Projekto Nederlando 84/2. p.27–28.
251. — El AALE-Bulteno 84/1. p.7–8.
252. — Protokolo de la Printempa Estrarkunsido de ILEI 84/2. p.29–34.
253. — Amendoj kaj modifoj de la Internacia Pedagogia Ekzameno de ILEI 84/2. p.35–36.
254. — Studobjektoj de JPE 84/2. p.37–42.
255. — Raporto pri Fakkunveno de Instruistoj en Ŷkofja Loka 84/2. p.46–47.
256. — D-ro Peter Zlatnar, unua honora membro de ILEI 84/3. p.19.
257. — De Ŝkofja Loka ĝis Kungälv 84/3. p.50–53.
258. — Sugestopedio (el Bulteno de la Amerika Asocio de E-instruistoj) 84/3. p.55.
259. — Deklaro omaĝe al prof. d-ro Ivo Lapenna 84/3. 4paĝa enmetaĵo

260. — Taskoj por la Estraro kaj Landaj Sekcioj dum la periodo 1984–1985. 85/1. p.14.
261. — Raportoj de landaj sekcioj 85/1. p.15–24.
262. — Mario Dazzini mortis 85/2. p.25.
263. — Internaciaj Konferencoj de ILEI 85/2. p.40.
264. — Financa raporto de ILEI 1984. 85/2. p.46–47.
265. — Rezolucio de la 19-a Konferenco 85/3. p.78.
266. — Loko de ILS 85/3. p.79.
267. — Redaktistaj notoj 86/1. p.1–2.
268. — Instrupraktiko: Specimena ekzameno 86/1. p.23–25.
269. — Ruĝa krajono: En kiu lando situas Budapeŝto? 86/1. p.26–27.
270. — Rezolucio de UNESKO en Sofio, la 6-an de novembro 1985. 86/1. p.31–32.
271. — Eŭropa Kultura Forumo en Budapeŝto 86/1. p.33–34.
272. — ILEI-ekzameno dum SUS de AIS en San Marino 86/1. p.34.
273. — Librobreto. Recenzetoj pri lernolibroj de Isajev, Bociort, Imbert -Sekelj- Špoljarec-Štimec- Ti šljar, So Gilsu, Wells, Eicholz, Princz, Klemola; pri verkoj de Šulco: Pledo por unueca lingvo; Blanke: Internationale Plansprachen; Migliorini: Lingvaj aspektoj de Esperanto. 86/1. p.39–43.
274. — Instrupraktiko: Cseh-metodo en nova ,,profesia'' vesto 86/2. p.15–16.
275. — Kadrotemo de la XXa ILEI-Konferenco: Pacon 86/2. p.19–25.
276. — La konferencejo kaj la konferencurbo 86/2. p.28–32.
277. — Sugestoj de la vicprezidanto 86/2. p.38–39.
278. — Librobreto: recenzetoj pri diplomlaboraĵoj de Lo Jacomo, Pala, Papp, Varga, Szolnok, Ĝorĝević. 86/2. p.49–54.
279. — Post la dudeka 86/3. p.1–8.
280. — ILEI-membroj 1976–1985. 86/3. p.9.
281. — Instrumetodoj: Cseh-metodo 86/3. p.23–28.
282. — Instrumetodaj gvidlibroj 86/3. p.29.
283. — Forumo: Ĉu ekzistas ,,hungarsperanto''? 86/3. p.38–39.
284. — Librobreto: infanlibroj; Selten-Pool: Ĉu mi lernu Esperanton?; Tangerud: Esperanto-grammatik; Mariano: Sisteme Ordigita Vortaro; MacGill: Streĉ' eĉ, Steĉj-skeĉ! 86/3. p.49–54.
285. — Dokumento ,,Lerneja projekto'' 86/3. p.55.
286. — Retrospegulo: Gyula Baghy 87/1. p.22.
287. — Raporto pri la 4-a IMS, Hungario 87/1. p.29–33.
288. — El la vivo de niaj sekcioj 87/1. p.34.
289. — Librobreto: infanlibroj el Ĉinio 87/1. p.36.
290. — El la vivo de Sekcioj 87/2-3. p.56–57.
291. — Librobreto: Szerdhelyi: Kevés szóval; Klag: Die Plansprache Esperanto; Opus Nigrum 87/2-3. p.66–67. 293. — Gazetara komuniko: Esperanto-fako pluiras en la budapeŝta universitato 88/1. p.12–13.
294. — Tago de la lernejo 88/1. p.21–22.
295. — Aktualaĵoj 88/1. p.57–63.
296. — La VI-a Internacia Metodika Seminario en Stražnice 88/2. p.32–35.
297. — Revuoj: ,,La racia lingvo'' , ,,Ĉeroka Esperantisto'', Opus Nigrum 88/2. p.35–37.
298. — Raportoj: 22a konferenco de ILEI, 23a konferenco de ILEI, Interesaj laborrenkontiĝoj, Nova fakliteraturo en Esperanto: Mineralnomoj, Akademio Internacia de la Sciencoj San Marino 88/2. p.38–44.
299. — Raportoj: Esperanto en la dua jarcento; Mozaiko kaj diskuto (Tago de la Lernejo) 88/3. p.24–25.
300. — ILEI tutmonde 88/3. p.26–30.
301. — Leterkesto 88/3. p.31.
302. — Anoncoj: Projekto de nova lernolibro pri fiziko; Ĉu silenti en la klasĉambro?; Mondkongreso de Monda Asocio pri Psikiatrio de infanaĝo kaj pri koncernaj sciencoj; Lingvoinst-



303. — Nia leterkesto 88/4. p.23.
304. — Libroj, gazetoj, interesaĵoj: Lins: La danĝera lingvo; Cvirka: Koko kantisto kokerikisto; Klag: Sukero, nutrado, kario; Der Esperantist; Mondo kaj ni; Survoje; La laŭta vekhorloĝo; Mondo de universitato 88/4. p.26–27.
305. — Renkontiĝoj: IMS; Freinet-renkontiĝo; Dua Intensiva Pedagogia-Metodika Kurso; 88/4. p.28–30.
306. — Anoncoj kaj raportoj: Cseh-metodo sur video-kasedo; Muzik-instruistoj kaj -emuloj atentu; Esperantistaj prelegantoj serĉataj 88/4. p.31–32.
307. — Raporto pri la 7-a Ims en Poprád 89/1. p.17–20.
308. — Nia leterkesto 89/1. p.21–22.
309. — Rezultoj de la ILEI-enketado 89/1. p.29–35.
310. — Akademio Internacia de la Sciencoj 89/1. p.35–36.
311. — Landa agado: Irano, Aŭstrio, Svedio, Hungario,... 89/2. p.27–34.
312. — MIE — Monato de Internacia Enketado 89/2. p.34.
313. — 23-a konferenco de ILEI. Protokoloj de la ĝeneralaj kunsidoj; Raportoj pri la estraraj kunsidoj 89/3. p.19–23.
314. — El la vivo de niaj sekcioj 89/3. p.29–30.
315. — Informoj 89/3. p.31–36.
316. — Fondaĵo Szerdahelyi 89/4. p.10–11.
317. — Esperanto-fako por eksterlandanoj lanĉota en la Universitato Eötvös 89/4. p.23–24.
318. — Recenzo: Interlinguistics 89/4. p.30–32.
319. — Informoj, notoj, novaĵoj, alvokoj 89/4. p.33–36.
320. — 8-a IMS 90/1. p.14.
321. — Diversaj edukaj aranĝoj (Svedio, Francio, Hungario, Slovakio, Finnlando, Germana DR) 90/1. p.22–26.
322. — Leterkesto 90/2. p.15.
323. — Diversaĵoj 90/2. p.17–20.
324. — Ĉu ni enketis sufiĉe? 90/2. p.21–27.
325. — ILEI labortable 90/2. p.28–29.
326. — Financa raporto de ILEI 1989. 90/2. p.34–35.
327. — Principa regularo de la supera nivelo de la internaciaj ekzamenoj de ILEI/UEA 90/3. p.17–20.
328. — Interkonsento inter UEA kaj ILEI 90/3. p.23.
329. — Recenzoj: Weekmann: La ronkanta avo; De Lajerte: Vortoj de profesoro Th. Cart; Paroligiloj de Stanley Nisbet 90/3. p.24–25.
330. — Diversaĵoj 90/3. p.27–30.
331. — Buĝeto 1991 por ILEI 90/3. p.29.
332. — Internaciaj ekzamenoj 90/3. p.31.
333. — Por statistiko de 1989. 90/3. p.32.
334. — Leteroj 90/3. p.35.
335. — Resumo pri la Internacia Seminario en Bad Saarow 90/4. p.8–12.
336. — Informoj, novaĵoj 90/4. p.36–38.
337. — Ni mencias (koncizaj resumoj pri ricevitaj eldonaĵoj) 90/4. p.39–40.

## ALVOKO AL SEKCIOJ!

NE FORGESU NOMI VIAJN ASEMBLEANOJN POR VOSS !!
NE FORGESU KOTIZI POR 1991 !!
NE FORGESU RAPORTI PRI LA JARO 1990 !!!!

Pri ĉiuj temoj vi devas esti ricevintaj respondilojn de nia kasisto.

## TEM-INDEKSO 1980 – 1990

Laŭtema indekso por jarkolektoj 1980–90 de Internacia Pedagogia Revuo (La ciferoj referencas al la laŭaŭtora indekso)


Aranĝoj (krom ILEI-konferencoj) 321;
A.E.D.E. 238;
Azia Konferenco de E-instruado 175;
Fakkunveno de instruistoj 255;
en Grésillon 225; 235; 236;
ILEI-Simpozio 33;
IMS 16; 287; 296; 305; 307; 320;
Internacia Lernejo 244.
Internacia Lerneja Semajno 245; 249; 266;
Internacia Seminario en Bad Saarow 335;
Konferenco pri adolto-edukado 167;
Kunordigaj Konferencoj 34;
Kuritibo 35;
Tutamerika Konferenco 88.
UK,Tago de Lernejo 17; 111; 294; 299;
ILEI
Ekzamenoj 108; 113; 253; 272; 327; 332;
Financoj 3; 4; 264; 326; 331;
Historio 92;
Labordokumentoj 109; 112; 116; 137; 163; 174; 185; 191; 233; 239; 252; 260; 279; 277; 280; 325;
Sekciaj raportoj 261; 288; 290; 311; 314;
Statuto 115; 227; 229;
ILEI-Konferencoj 263;
Festparoladoj, prelegoj 159; 164; 216; 194; 196;
Kadrotemo 107; 275;
Laborgrupoj 7; 218;
Loko 5; 94; 157; 248; 276; 199;
Raporto 12; 110; 160; 166; 173; 176; 177; 212; 217; 223; 231; 246; 257; 298; 313;
Rezolucio 265.
Interlingvistiko 9; 24; 32; 36; 39; 51; 59; 69; 70; 76; 78; 86; 96; 100; 121; 132; 145; 146; 168; 188; 204; 243; 283; 285;
IPR 44;
Lernejpolitiko 6; 27; 37; 48; 83; 87; 102; 106; 118; 125; 138; 165; 181; 183; 219; 254; 285;
– en elementa lernejo: 25; 42; 139;
– en mezlernejo: 82;
– en universitato: 52; 89; 136; 293; 317;
– en Belgio: 38;
– en Bulgario: 8;
– en Germanio: 162;
– en Hungario: 293; 317;
– en Irano: 79;
– en Italio: 139;
– en Jugoslavio 206;
– UEA: 63; 285;
Lingvistiko 22; 23; 36; 45; 46; 54; 55; 57; 58; 68; 80; 124; 135; 147; 189; 190;
Literaturo 148; 134; 179; 286;
Metodiko de Esperanto-instruado 10; 29; 74; 95; 133; 152; 170; 181; 182; 192; 202; 204;
Edukado 61; 117; 149; 153; 201;
Eksperimentoj 42; 47; 93; 158;
Ekzercoj 104; 105; 207; 268;
Eraroj 98;
Gramatiko 55; 56;
Instruista personeco 15; 30; 122; 206;
Instruprogramoj 31;
Lernolibroj, instruhelpiloj 28; 50; 59; 72; 81; 90; 126; 127; 129; 130; 153; 302;
Lingvo-orientiga instruado 18; 73;
Ludoj 19; 40; 43; 53; 120; 140; 169;
Metodoj, manieroj 71; 103; 119; 151; 258; 274; 281; 282;
Motivado 14; 30; 144; 153; 285;
Teknologio 123;
Matematiko 10; 150;
Nekrologoj
M. Dazzini 262; P. Zlatnar 99; A.C.E. Childs-Mee 114; H. Sonnabend 184; Szerdahelyi I. 172; 178;
Organizaĵoj
Akademio 1; 2;
AIS 128; 272; 310;
Eŭropa Asocio de la Instruistoj 131;
Eŭropa Parlamento 219;
KCE 49;
UEA 328;
UNESCO 11; 270;
Psikologio 66; 203; 302;
Recenzoj
Belletraĵoj 84;85;
Diplomlaboraĵoj 91; 278;
Infanlibroj 13; 64; 65; 284; 289;
Instruhelpiloj 155; 156;
Lernolibroj 41; 59; 62; 67; 144; 197; 200; 273; 284; 291; 302;
Metodikaj verkoj 101; 195; 234; 282;
Revuoj 297; 318;
Vidbendoj 26; 306;
Sociologio 77; 204;
Statistiko 141; 142; 309; 324; 333;


*La indeksojn kompilis*
*Kovács Márta, Hungario.*



Propono, pritraktota dum la 25a Konferenco de I.L.E.I. en Voss/ Norvegio, pri la

STATUTO
de INTERNACIA LIGO de ESPERANTISTAJ INSTRUISTOJ
**I.L.E.I.**

**IDENTECO**
**Artikolo 1**
La nomo de la organizaĵo estas:
1.1 "Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj"; mallonge I.L.E.I.
1.2 En la plua teksto de tiu ĉi statuto ĝi estas nomita: "La Ligo".
**DIFINOJ**
**Artikolo 2**
2.1 La Ligo estas fondita en la jaro 1949 por nelimigita tempo.
2.2 La Ligo estas faka organizaĵo pri edukado kaj instruado.
2.3 La Ligo estas demokratia organizaĵo, memstara en rilatoj kun aliaj organizaĵoj kaj institucioj.
2.4 La Ligo estas aliĝinta al UNESKO en Kategorio C, aŭgusto 1977; listo CPX/77/10 S.7, numero 1100.
2.5 La bazaj principoj por La Ligo estas tiuj de la Universala Deklaracio de la Homaj Rajtoj kaj la Universala Deklaracio de la Rajtoj de la Infano.
2.6 La Ligo havas sian sidejon en la Respubliko San Marino, jure rekonita de la Ŝtata Konsilio de la XII regantoj; "Practica 0485 V.B.6 V. N.4"; la 26an de aprilo 1985. La oficiala lingvo de La Ligo estas la Internacia Lingvo, Esperanto.
**CELOJ**
**Artikolo 3**
La celoj de La Ligo estas:
3.1 Edukado al estimo de la Homo.
3.2 Progresigo de la interkompreniĝo inter la popoloj.
**TASKOJ POR ATINGI LA CELOJN**
**Artikolo 4**
4.1 Unuigi geinstruistojn esperantistajn en la mondo por sisteme labori por la enkonduko de Esperanto en ĉiuspecajn lernejojn.
4.2 Atenti,esplori kaj analizi pedagogiajn problemojn en la lingvo-instruado kaj labori por solvi ilin.
4.3 Iniciati, organizi kaj subteni sciencajn esplorojn pri la instruado de fremdaj lingvoj.
4.4 Organizi interŝanĝojn de spertoj el la pedagogiaj scienco kaj praktikado por plibonigo kaj modernigo de la instruado de fremdaj lingvoj, speciale de Esperanto.
4.5 Organizi diversspecajn internaciajn aranĝojn por infanoj cele al

interkompreniĝo pere de la Internacia Lingvo.
4.6 Organizi pedagogiajn konferencojn kaj laborkunvenojn.
4.7 Aranĝi internaciajn ekzamenojn pri kapablo de apliko kaj instruado de Esperanto.
4.8 Kontakti kun registaraj kaj edukaj instancoj kaj aliaj organizaĵoj kies celoj estas konformaj al tiuj de La Ligo.
4.9 Eldoni publikaĵojn kaj komunikojn.
4.10 Apliki aliajn leĝe permesatajn rimedojn.

**MEMBRECO**

**Artikolo 5**

5.1 Ĉiu persono, kiu rekonas la statuton,sin okupas pri edukado kaj instruado, rajtas membriĝi.
5.2 Membroj distingiĝas jene: "Sekciaj membroj" kaj "Individuaj membroj".
**Ĉeso de membreco** okazas pro:
5.3 Deziro de la membro.
5.4 Kontraŭstatuta ago de la membro.
5.5 Forpaso de la membro.

**FINANCAJ RIMEDOJ**

**Artikolo 6**

La financaj rimedoj de La Ligo estas:
6.1 Membrokotizoj.
6.2 Donacoj.
6.3 Rentoj kaj heredaĵoj.
6.4 Aliaj enspezoj.

**LA ORGANIZA STRUKTURO**

**Artikolo 7**

La organoj de La Ligo estas:
7.1 La Komitato.
7.2 La Estraro.
7.3 La Sekcioj.

**La Komitato**

7.1.1 estas la supera decida organo de La Ligo.
7.1.2 konsistas el membroj de la sekcioj kaj individuaj membroj.
7.1.3 kunsidas minimume unufoje jare.
7.1.4 decidas pri akcepto kaj/aŭ ŝanĝo de la statuto.
7.1.5 rajtas nomi kandidatojn por la estraro.
7.1.6 elektas la membrojn de la estraro el kiuj la prezidanton kiel funkciulon.
7.1.7 rajtas pridiskuti kaj prijuĝi la faritan laboron de la estraro, de la sekcioj kaj de la komisionoj.
7.1.8 povas senŝarĝigi la estraron.

Propono, pritraktota dum la 25a Konferenco de I.L.E.I. en Voss/ Novergio, pri la

INTERNA REGULARO
de la INTERNACIA LIGO de ESPERANTISTAJ INSTRUISTOJ
**I.L.E.I.**

**Tiu ĉi regularo estas por interna uzado de La Ligo kaj celas kompletigi la Statuton. La numerado de la artikoloj sekvas tiun de la Statuto. Se iu artikolo ne estas menciita, ĝi ne bezonas aldonon.**

**Artikolo 2.**

2.8 La Ligo estas aliĝinta faka organizaĵo en la Universala Esperanto Asocio.

**Artikolo 4.**

**PUBLIKAĴOJ:**

4.9.1 La regula publikaĵo de La Ligo nomiĝas:
"Internacia Pedagogia Revuo, IPR."
4.9.2 IPR aperas minimume tri fojojn en la jaro.
Pri titoloj de aliaj publikaĵoj decidas la estraro.
4.9.3 La redaktoro de IPR estas oficisto.

**Artikolo 5.**

**MEMEBRECO**

5.1 Membreco validas por unu jaro kaj plilongiĝas per la sama tempo.
5.2.1 Membroj loĝantaj en teritorio kie estas sekcio, estas Sekciaj Membroj. Membroj loĝantaj en teritorio kie ne estas sekcio, estas Individuaj Membroj. Kvin Individuaj Mmembroj rajtas nomi unu komitatanon.
5.2.2 Ĉiu membro povas fariĝi Dumviva Membro paginte dudekoblan jarkotizon.
5.2.3 Honora Membro estas nomita surbaze de siaj meritoj por La Ligo aŭ por la instruado de Esperanto.
5.2.4 La membroj havas la rajton:
Ĉeesti ĉiujn kunsidojn de La Ligo.
Ricevi la eldonaĵon de La Ligo.
Starigi demandojn kaj doni konsilojn al la organoj de La Ligo.

**ĈESO DE MEMBRECO**

5.3 Membro povas fini sian membrecon per skriba sciigo, al La Ligo aŭ al la Sekcio, minimume du monatojn antaŭ la fino de la jaro.
5.4.1 La Ligo aŭ la Sekcio povas eksigi membron pro kontraŭstatuta ago. Dujara nepago de la jarkotizo ankaŭ estas kontraŭstatuta ago.
5.4.2 Kontraŭ la sub 5.8 nomita decido eblas apelacii ĉe la Komitato, ĝis unu monato post la ricevo de la sciigo. Tiukaze la eksigo estas prokrastata ĝis la decido de la Komitato.
5.5 Pri forpaso de membro La Ligo estu informita kiel eble plej baldaŭ.

**FINANCAJ RIMEDOJ**

**Artikolo 6.**

6.1 La kotizo devas esti pagita antaŭ la unua de februaro, de la sekciaj membroj al la estraro de la sekcio, de la individuaj membroj al la estraro de La Ligo.

**LA ORGANIZA STRUKTURO**

**Artikolo 7.**

**La Komitato**

7.1.4 decidas ankaŭ pri akcepto kaj/aŭ šanĝo de la interna regularo.

7.1.6 escepte tiude la prezidanto, la estraranoj dividu la funkciojn inter si. La elekto de estraranoj okazas skribe. Kandidato estas elektita havante la plej multajn el la validaj voĉoj. Sindetenoj ne estas voĉoj. En kazo de unu kandidato, la prezidanto rajtas proponi voĉdonon per levo de la manoj. Eksiĝinta estrarano estas reelektebla. En kazo de intertempa eks iĝo de estrarano, la ceteraj anoj respondecas pri daŭrigo de ties laboro.

7.1.7 de la prijuĝoj ricevas raporton la estraro, la sekcioj kaj la komisionoj.

7.1.8 se la prijuĝo pri la laboro de la estraro estas pozitiva, la komitato senŝarĝigas la estraron pri la fininta organiza jaro.

7.1.9 povas starigi kaj nuligi laborkomisionojn por difinitaj taskoj kaj tempodaŭroj. Laborkomisiono konsistas el minimume tri membroj el kiuj minimume unu estas komitatano. Laborkomisiono raportas al la estraro laŭ interkonsentita maniero. Pri financoj por laborkomisiono estu skriba in terkonsento inter la membroj kaj la estraro.

7.1.10 la gvidlinioj estas skribe fiksitaj por minimume tri jaroj, ili povas esti adaptitaj intertempe.

7.1.11 Se ekzistas gravaj duboj pri la ekzistebleco por sekcio eblas malakcepti ĝin. En kazo de kontraŭstatuta ago aŭ ne plenumo de ĝia organiza devo eblas eksigi sekcion.

7.1.12 povas senrajtigi komitatanon, se la sekcio aŭ grupo de individuaj membroj, kiu delegis lin, agis kontraŭstatute. Neakurate plenumi la financajn devojn estas kontraŭstatuta ago.

7.1.13 La membrokotizo estas fiksita por unu jaro.

7.1.14 La Kontrola Komisiono pri Financoj konsistas el minimume du membroj kaj unu vicmembro; el ili ĉiujare unu eksiĝu. La komisisono raportas al La Komitato.

7.1.16 En kazo de egaleco de la validaj voĉoj, la propono estas malakceptita. La prezidanto rajtas postuli duan voĉdonon, eventuale skriban. Sindetenoj ne estas voĉoj. La membroj de la estraro havas voĉdonrajton; escepte pri aferoj pri kiuj ili me m respondecas.

7.1.17 En kazo de malfondo de La Ligo la temo estu anoncita minimume ses monatojn antaŭ la kunsido.

**LA ESTRARO**

7.2.1 gvidas La Ligon kaj rajtas decidi pri ĉiuj aferoj inter du kunsidoj de la komitato atentante la gvidliniojn, nomitaj sub 7.1.10.

7.2.3 la oficodaŭro estu tiel aranĝita, ke la prezidanto, la sekretario kaj la estrarano pri financoj eksiĝu en sinsekvaj jaroj. La unuan fojon ili regulu la sinsekvon inter si.

7.2.4 sciigas la proponojn al la komitato minimume tri monatojn antaŭ la venonta kunsido.

7.2.5 la raportado de la sekretario kaj de la estrarano pri financoj al la komitato okazas skribe, tiel ankau la buĝetoj.

**LA PREZIDANTO:**

Kunvokas kaj prezidas la kunsidojn de la estraro kaj de la komitato.
Reprezentas La Ligon en eksteraj rilatoj.
Respondecas pri ĉiuj agoj de la estraro al La Komitato.
Havas la rajton sin anstataŭigi.

**LA CETERAJ MEMBROJ DE LA ESTRARO ZORGAS PRI:**

La organiza stato de La Ligo.
Kontakto kun la sekcioj kaj la individuaj membroj.
Kolekto de la kotizoj, gardo de la bonhavoj kaj la administrado de la spezoj de La Ligo.
Entrepreno kaj ebla efektivigo de agoj kiuj povas servi al la celo de La Ligo.

**LA SEKCIOJ**

7.3.1 Agas en difinita teritorio, kiu estas priskribita interkonsente kun la estraro.

7.3.2 Estas dezirinde, ke sekcio havu leĝan staton en la teritorio.

7.3.3 Nomas komitatanojn laŭ la ĉisuba tabelo:

| komitatanoj: | 1 | 2 | 3 | 4 | 5 |
|---|---|---|---|---|---|
| membroj: | 5 | 15 | 35 | 50 | 100 |

por ĉiu plia kvindeko da membroj unu komitatano.

7.3.6 Okupiĝas pri varbado de membroj kaj simpatiantoj.

Elektas estraron de minimume tri membroj.

Unu estrarano respondecas pri la korespondado kun la sekretario de La Ligo.

Pagas la kotizon ĉiujare antaŭ la 31-an de marto al la estrarano pri financoj de La Ligo..

Raportas skribe al la sekretario de La Ligo pri siaj agoj kaj atingoj dum la pasinta jaro antaŭ la 30-a de junio.

Nomas reprezentanton ĉe la landa UNESKO-komisiono.

7.1.9 rajtas starigi kaj nuligi laborkomisionojn.
7.1.10 decidas pri la sekvindaj gvidlinioj.
7.1.11 decidas pri la akcepto aŭ eksigo de sekcioj.
7.1.12 povas senrajtigi komitatanon pro kontraŭstatuta ago.
7.1.13 fiksas la membrokotizon.
7.1.14 nomas, el sia medio, la membrojn de la "Kontrola Komisiono pri Financoj".
7.1.15 prijuĝas la raportadona de la Kontrola Komisiono pri Financoj.
7.1.16 decidas per simpla plimulto de validaj voĉoj; escepte en la kazo de la sub 7.1.17 nomita.
7.1.17 decidas per minimume du trionoj de la validaj voĉoj pri malfondo de La Ligo.

**LA ESTRARO:**

7.2.1 gvidas La Ligon.
7.2.2 konsistas el nepara nombro da membroj, minimume kvin, nome; prezidanto, sekretario, estrarano pri financoj, vicprezidanto kaj vicsekretario.
7.2.3 havas trijaran oficodaŭron.
7.2.4 faras proponojn al la komitato.
7.2.5 raportas kaj respondecas pri siaj agoj al la komitato.
7.2.6 rajtas proponi kandidatojn por la estraraneco.
7.2.7 rajtas okazigi skribajn voĉdonojn de la komitatanoj.
7.2.8 rajtas nomi kaj/ aŭ anstataŭi oficistojn.
7.2.9 rajtas inviti gastojn al siaj kunsidoj kaj al tiuj de la komitato.

**LA SEKCIOJ:**

7.3.1 agas en difinita teritorio.
7.3.2 povas esti fondataj de minimume kvin membroj.
7.3.3 nomas komitatanojn.
7.3.4 rajtas fari proponojn al la komitato.
7.3.5 rajtas nomi kandidatojn por la estraro.
7.3.6 respondecas pri ĉiuj siaj agoj.

**LA ORGANIZA JARO:**

**Artikolo 8**

8.1 La organiza jaro egalas al la kalendara jaro.

**LA REGULARO**

**Artikolo 9**

9.1 Al tiu ĉi statuto apartenas interna regularo.

**FAKA KONFERENCA TEMO:**
**Konsciigo pri lingvaj problemoj en la Esperanto-Instruado**

# Testu vian scion pri la angla lingvo

**Walter KLAG**

Faru kruceton ĉe la elektitaj respondoj kaj adiciu la poentojn. La solvojn vi trovos aliloke.

1. La angla estas gepatra lingvo de
A: 23,4% el la monda loĝantaro (4 poentoj)
B: 12,8% (3 poentoj)
C: 6,8% (2 poentoj)
D: 1,2% (1 poento )

2. Ankaŭ ekstere de la anglalingva regiono vendiĝas anglalingvaj gazetoj kaj magazinoj. La eldonkvanto estas sume ĉirkaŭ
A: 750 milionoj (konformus al 15% el la ne-angle parola loĝantaro) (3 p)
B: 90 milionoj (konformus al 1,8%) (2 p)
C: 15 milionoj (konformus al 0,3%) (1 p)

3. Dum la lastaj 30 jaroj la angla kiel gepatra lingvo, esprimita per elcentoj el la monda loĝantaro,
A: malkreskis (1 p)
B: kreskis (3 p)
C: ne multe ŝanĝiĝis (2 p)

4. Dum internaciaj konferencoj de UN
A: oni preskaŭ ekskluzive parolas angle (4 p)
B: en 11% el la kazoj oni bezonas interpretistojn (3 p)
C: en 55% el la kazoj oni bezonas interpretistojn (2 p)
D: oni preskaŭ ĉiam bezonas interpretistojn (1 p)

5. La oficiala(j) lingvo(j) de la internaciaj organizaĵoj estas
A: preskaŭ ĉiukaze la angla
B: preskaŭ ĉiam la angla kaj pliaj (2 p)
C: plejofte pluraj lingvoj aŭ neniu oficiala lingvo (1 p)

6. Se dum internacia konferenco strikas la interpretistoj aŭ ne funkcias la simultaninterpreta instalaĵo
A: plejofte oni devas interrompi (1 p)
B: plejofte oni daŭrigas en la angla (2 p)

7. En Svislando la germana, franca, itala kaj romanĉa estas oficialaj lingvoj. En la svisa parlamento
A: oni parolas ĉiujn kvar lingvojn, la dokumentoj tradukiĝas (1 p)
B: oni parolas ĉiujn kvar lingvojn, sed oni ne devas traduki la dokumentojn, ĉar preskaŭ ĉiuj svisoj estas multlingvaj (2 p)
C: dum interkomprenaj malfaciloj plejofte oni parolas angle (3 p)

8. El la 174 sendependaj ŝtatoj de la mondo 109 havas pli ol 3 milionojn da enloĝantoj. El tiu 109 ŝtatoj en
A: 49 la angla estas la sola oficiala lingvo, 24 havas la anglan kaj plia(j)n oficiala(j)n lingvo(j)n (3 p)
B: 25 la angla estas la sola oficiala lingvo, 14 havas la anglan kaj plia(j)n oficiala(j)n lingvo(j)n (2 p)
C: 10 la angla estas la sola oficiala lingvo, 8 havas la anglan kaj plia(j)n oficiala(j)n lingvo(j)n (1 p)

**Analizo**
8 ĝis 9 poentoj: Vi subtaksas la rolon de la angla.
10 ĝis 11 poentoj: Vi ĝuste taksas la situacion.
12 ĝis 15 poentoj: Vi tro alte taksas la rolon de la angla.
16 ĝis 25 poentoj: La angla estas mito por vi.

## OFICIALA SITUACIO DE LA ESPERANTO-INSTRUADO EN LA MONDO

**8a ĝisdatigita eldono, Germain PIRLOT, Oostende Belgio, junio 1990**

**Sur 24-paĝoj, ĉi tiu jam konata eldonaĵo resumas la nuntempan staton de universitat-nivela instruado de Esperanto. Unue ĝi donas informojn pri kursoj rekonfirmitaj aŭ nov-anoncitaj por 1990. De tiuj estas 2 en Aŭstrio, 5 en Brazilo, 4 en Bulgario, 31 en Ĉinio, 5 en Francio, 8 en Germana DR, 3 en FR Germanio, 1 en Hispanio, 5 en Hungario, 5 en Koreio, 1 en Nederlando, 1 en Niĝerio, 1 en Pollando, 1 en Sanmarino, 3 en Sovet-unio, 3 en Sudafriko, 1 en Svedio, 5 en Usono kaj unu en Venezuelo. Pliaj 25 kursoj funkciis en antaŭaj jaroj, sed nesciate ĉu ankoraŭ en 1990. Tiu alta proporcio de nerespondemo emigis la kompilinton ne plu daŭrigi la enketadon (vidu IPR 90/3, p. 34). La libron kompletigas resumo pri la leĝa stato de Esperanto en lernejoj de 34 landoj. Ekzemplero estas ricevebla kontraŭ 100 belgaj frankoj ĝirotaj al pĝk. 000-0259390-12 de G. Pirlot, Steenbakkersstr. 21, B-8400 Oostende, Belgio, aŭ 4 irpk.**



**FAKA KONFERENCA TEMO:**
**Konsciigo de la lingva problemo en la mondo pere de Esperanto-Instruado**

## Sed kia estas la mondo de lingvoj?

Jen la unua demando starigenda, se ni volas en nia instruado atentigi pri lingvaj problemoj. La artikolo de Walter KLAG jam devigis vin inspekti viajn supozojn pri la angla lingvo; per serio da kvizecaj demandoj ni aliros la temon pli ĝenerale. Diferenco inter la du artikoloj estas, ke s-ro Klag kompatis la legantojn kaj anoncis la respondojn. La nuna aŭtoro estas pli malica kaj prokrastos la respondojn ĉu ĝis la sekva IPR, ĉu ĝis la someraj kongresoj! Memoru, ke la temon ni traktos kaj en Voss kaj en Bergen en la 'Tago de la Lernejo'.

Nur kiam ni difinis la plej gravajn enhavon kaj faktojn de la temo, eblas diskuti kiel prezenti aŭ malkovrigi tion en la instruado.

La sekvaj demandoj baziĝas sur materialo de la 'Lerneja projekto' de s-ro Harold Brown, kiun ILEI siatempe transprenis sed ĝis nun malmulte sukcesis utiligi. Demandoj similaj al la subaj tamen aperis kvizforme en angla-lingva lego-libro 'Tracking down the Hero', kune kun rakontoj kaj legaĵoj tradukitaj el 'Juna amiko', do tamen parteto de la lerneja projekto trovis sian vojon al hungaraj lernantoj.

Ĉar vi ne estas lernejana publiko, ni iomete severigis kelkajn demandojn! Sed la celo ne nepre estas, ke vi respondu la demandojn ĝis via propra kontentiĝo, ĉar pluraj postulus doktorigajn distertaciojn! Pli interese estas doni tiom da respondo kaj tian respondon, kiun oni volus instrui al lernantoj. Pripensu ankaŭ, kiuj povus esti la tipaj respondoj de lernantoj en via lando pri la demandoj – ĉu ili estas bone informitaj, ĉu ili kredas mitojn? Ek al ekzameno!

1. Proksimume kiom da personoj vivas en la mondo?
2. Proks. kiom da lingvoj ekzistas en la mondo? Kial ne eblas scii precize?
3. Proksimume kiom da lingvoj havas pli ol milionon da parolantoj?
4. Kiu lingvo havas la plej grandan nombron da parolantoj?
5. Provu listigi laŭvice la dek plej parolatajn lingvojn.
6. Kiuj lingvo-popoloj kreskas plej rapide? Kiuj malpli rapide?
7. Nomu 'mortajn' lingvojn, kiujn oni ne plu parolas.
8. Nomu la ĉefajn lingvo-familiojn kaj sub-familiojn.
9. Kiu lingvo-familio estas la plej granda? Al kiu apartenas via lingvo?
10. Kiom da oficialaj lingvoj estas en Unuiĝintaj Nacioj? Kiuj? Kiel oni elektis ilin? Kiun oni laste aldonis? Kial?
11. Kiom da oficialaj lingvoj estas en la Eŭropa Komunumo?
12. Kiom da traduk-direktoj estas bezonataj en la Eŭropa parlamento?
13. Kiel lingvoj naskiĝas? Kio estas dialekto? Kiel ĝi estiĝas?
14. Ĉu vi povas nomi kelkajn landojn, kie estas pli ol unu oficiala lingvo?
15. Donu ekzemplojn de vortoj pruntitaj el unu lingvo kaj uzata en alia.

**16** Kiom vi scias pri lingvoj kreitaj kaj lanĉitaj de unu persono? Kial oni kreis tiajn lingvojn?

**17** Kiom vi scias pri la unu tia lingvo, kiu nun estas vivanta, parolata lingvo? Kiu iniciatis ĝin, kie, kial. Kiuj uzas ĝin, kiel, kial.

**18** Jen la skriba formo de kelkaj lingvoj. Provu rekoni ilin:

a ווּ.ש ,זאגט מיר דער ווּרעסטער

b Người cảm dao cắm thuổng

c จังหวัดนครศรีธรรมราช

d ተረጕሙ ፡ እንዲረዳ ፡ ነው

e көсйысям Ключ синмыдлы

f 늦기는 각가지 옳식비 ᄆᆞᆷ미


g ოლოგიური სისტემის არსებ

h Inupilorujugssuaq sorssugjiartorpat.

i Dan kotaku, ah kotaku.

j Ne sorga, snotor guma.

k E rua eenei mea.



**Jen la popola altlernejo de Voss, nia konferencejo. Agrable situita inter herbejoj kaj montoj, komforte kaj taŭge ekipita, ĝi permesos al ni agrable konferenci kaj diskuti la ĵus prezentitajn temojn.**



**KADRA KONFERENCA TEMO:**

# Demandoveke tra la Manifesto

En nia lasta numero de IPR ni malfermis nian kongresan temon pri strategia planado por nia movado. Ni esploris la Deklaracion de Tireso kaj la Manifeston de Raŭmo. Ĉi-foje ni studu la duan dokumenton, nun dek-jaran, pli detale. Por ne tedi vin per longa artikolo kaj eviti jam tuj trudi miajn proprajn opiniojn ni aliru la demandon didaktike. La Manifesto fakte levas pli da demandoj ol ĝi kontentige respondas. Ni do starigu la demandojn por via persona medito aŭ eĉ grupa diskuto. Viaj skribaj reagoj bonvenas. En la venonta IPR ni provos doni iujn respondojn, prepare al la diskut-rondoj en Voss, kie la demandoj formos la bazon de niaj diskutoj.

Ni reaperigas la tekston de la Manifesto sekvontpaĝe.

*Krizo de identeco:*

1. Kiomgrade vi mem kredas, ke Esperanto devus iĝi la dua lingvo por ĉiu?
2. Kiomgrade vi opinias, ke la esperantistoj kredas tion?
3. Kiomgrade vi mem kredas, ke ĝi efektive atingos tiun lokon?
4. Laŭ via supozo, kiam plej frue, tio povos okazi?
5. Laŭ kiu vojo, laŭ kiuj cirkonstancoj, tio povus okazi?
6. Ĉu vi persone sentas frustracion pri la malrapida progreso de Esperanto al iu fina celo? Kiel tio influas vin?
7. Ĉu vi konsentas, ke la movado kolektive suferas krizon de identeco?
8. Se jes, kiuj estas la simptomoj kaj sekvoj de tio?
9. Elpensu aliajn formulojn ol la celo 'Esperanto – la dua lingvo por ĉiu', kiuj povus ĉu anstataŭi tiun, ĉu prezenti pli atingeblajn antaŭŝtupojn al ĝi.

*Kritiko de praceloj*

1. Kiomgrade Esperanto devas konkurenci kontraŭ la angla?
2. Kiomgrade la esperantistoj devus batali kontraŭ ĝi?
3. Kiel indus sinteni al ĝi kaj al iu ajn uzo de nacia lingvo por internacia komunikado?
4. Kiomgrade la Manifesto pravas, ke la rolo de la angla ne ĝenu nin?
5. Kiomgrade ni rezignu pri la oficialigo de Esperanto en la 90-oj?

*Niaj celoj*

1. Kiomgrade vi konsentas, ke la kvar donitaj valoroj de Esperanto estas la ĉefaj?
2. Pensante kiel instruisto, ĉu aliajn valorojn vi aldonus?
3. Pensante kiel instruisto, ĉu la propedeutikan valoron vi elstrarigus pli ol aliaj edukaj valoroj?

4. Kiuj estu la esencaj elementoj de tiu novtipa internacia kulturo, kiun ni devus heroldi?

*La kongresoj*

1. Kiomgrade vi konsentas pri la graveco de kongresoj?
2. Kiomgrade vi konsentas, ke ili prezentas la ĉefan vojon al kresko?
3. Kion alian vi listigus apud aŭ super kongresoj, kiel akceliloj al kresko?
4. Ĉu streboj por la uzo de Esperanto kiel laborlingvo en fakaj konferencoj internaciaj, ne estas fakte apliko de la slogano 'Esperanto – dua lingvo por ĉiu?'

*La finaj kredoj*

1. Ĉu vi samopinias, ke la unua jarcento pruvis ĝian taŭgecon esprimi ĉion?
2. Kiom ni en la okdekoj – la jardeko de la Manifesto – kreis kulture valoran kaj originalan? Komparu ĝin kun pli fruaj jardekoj.

*La Manifesto entute*

1. Kun kio en la Manifesto eblas plenkore konsenti?
2. Kun kio vi volus akre malkonsenti?
3. Kun kio oni povus modere konsenti, sed kun piednotoj?
4. Kiel la aplikistoj kaj la finvenkistoj trovu komunan terenon, kaj kia estus tiu agad-tereno?
5. Kiel harmoniigi la desuprajn oficialigajn kampanjojn kun la desubismaj kulturaj iniciatoj por ke ili povu minimume kunekzisti pace kaj pli dezirinde, ke ili fortigu unu la alian?

*Pliaj legaĵoj*

Ni povas rekomendi du lastatempajn tekstojn pri la manifesto. La unua nepozitiva de Dietrich Weidmann 'Kritika analizo de la Manifesto de Raŭma', kiu estas eseo kontribuita al la internacia fako de la Universitato ELTE en Budapeŝto. Ĝi donas fascinajn informojn pri la maniero en kiu la komitato de TEJO en la IJK en Raŭma fakte traktis kaj fine akceptis la tekston (en stilo iom tro persona por tia eseo!). La dua estas multe pli pozitiva: 'Dek jaroj post la Raŭma Manifesto' de Hektor Alos i Font, en 'Bulgara Esperantisto' 1990/12, p.1. Ĝi emfazas, ke la konceptoj de Raŭmismo vastiĝis tra la jaroj; oni nun ligas kun ĝi sloganojn aŭ ideojn ne aperintajn eksplicite en la origina dokumento.

Jen demandoj kaj leg-rekomendoj por sproni viajn pensojn; venont-numere pli da respondoj kaj opinioj, sed ankoraŭ pli da demandoj, por direkti niajn pensojn al la estontaj kredoj kaj planoj.

*Stefan MacGill*



## LA MANIFESTO DE RAUMO

*1. Krizo de identeco*

La subskribintoj konstatis kontraŭdiron en la sinteno de la esperantistaro, kvazaŭ konflikton inter idea superegoo kaj egoo: nia superegoo igas nin prediki al la aliaj homoj pri kelkaj mitoj:

- la dua lingvo por ĉiu (la angla lingvo estas nia malamiko), UNO devas adopti Esperanton ktp;
- kaj laŭdegi la lingvon eĉ neobjektive okaze de intervjuo;

samtempe inter ni, ni ĝuas kaj aplikas Esperanton laŭ tio, kio ĝi efektive estas, sendepende de la pracelaj sloganoj. Tio ja estas krizo de identeco, kaj ni sentas la neceson motivi nian esperantistecon per io pli kohera.

*2. Kritiko de praceloj*

Ni kredas, ke·

a. la oficialigo de Esperanto estas nek verŝajna, nek esenca dum la 80-aj jaroj – oni havu alternativajn celojn;
b. la faligo de la angla lingvo estas nek tasko, nek zorgo de esperantistoj,

finfine la angla rolas kiel helplingvo, analogie al la franca siatempe (eĉ malpli grave ol iam la franca mem); Zamenhof neniam proponis al la Movado kiel celon kontraŭstari la francan, ĉar por Esperanto li antaŭvidis pli valoran rolon.

*3. Niaj celoj*

Ni celas disvastigi Esperanton pli kaj pli, iom post iom realigi ĝiajn pozitivajn valorojn:

a. propedeŭtiko por lingvoinstruado;
b. kontaktoj inter ordinaraj homoj;
c. kontaktoj sendiskriminaciaj;
d. novtipa internacia kulturo.

Lige kun la lasta ni emfazas, ke la serĉado de propra identeco igis nin koncepti esperantistecon, kvazaŭ aparteno al mem elektita diaspora lingva minoritato. La kresko de niaj fortoj kaj ali ĝo de novaj homoj estas nepre kondiĉitaj de la konsciigo pri tiuj ĉi valoroj.

*4. La kongresoj kiel vojo al kresko*

Internaciaj kongresoj kaj renkontiĝoj estas esencaj por la asimiliĝo de homoj al nia lingva komunumo: necesas unuflanke kongresi pli ofte inter ni, kaj rezervu la kunsidadon de gvidorganoj al apartaj funkciulaj kunvenoj laŭ la modelo de la TEJO-seminario en Strasburgo (junio 1980), kaj aliflanke necesas fortigi la uzon de Esperanto kiel laborlingvo en fakaj konferencoj internaciaj, laŭ la modelo de Freinet-instruistoj.

*5. Ni kredas,*

Ke la unua jarcento de Esperanto pruvis la taŭgecon de la lingvo por esprimi ĉion; meze de la 80-aj jaroj, komence de la dua jarcento, ni devos ekmontri al la mondo, ke ni kapablas ankaŭ diri ion – ion kulture originalan kaj internacie valoran.

# ARBARA ETOSO STIMULA POR LABOR-KOLEKTIVO

## RAPORTO PRI LA ESTRARA KUNSIDO

Ĉi-sube vi trovas raporton pri la estrarkunsido de ILEI okazinta en Kalmthout de la 22-a ĝis la 24-a de februaro 1991. Ĝi estas malpli detala ol la pasint-jara, vi ne konkludu el tio, ke malpli da laboro estis farita! Sub 10 rubrikoj, pli ol cent tagordaj punktoj estis traktitaj, en la 20 horoj da kunsidado. La prezidanto proponis idealan kunven-lokon, en trankvila arbara medio, dum s-ino Symoens regalis estraranojn per serio da kulinaraj triumfoj.

Tuj fine de la kunsidoj ni preparis koncizan raporton kaj sendis ĝin al ĉiuj sekcioj. Jen iom pli da detaloj:

**1. Membraro**

En 1990 ni atingis pli ol 800 membrojn, unuafoje tra la lastaj dek jaroj (kp. 543 en 1985). Dek ses sekcioj funkcias adekvate, kvar nebone – aliaj havas ankoraŭ transpagproblemojn. La ĉeĥa sekcio anoncis novan sekciestron, s-ro M. Malovec. La du germanaj sekciestroj interrilatas cele al starigo de komuna sekcio. 14 respondiloj de sekcioj pri 1990 atingis nin. Respondilojn por 1991 la kasisto ĵus dissendis – ni resumos ilin en IPR2. Ni esperas je fondo de sekcio en Rumanio okaze de la 9-a IMS (Internacia Metodika Seminario) en aprilo. Eblecoj pri pliaj sekcioj kaj revivigo de nebone funkciantaj estas esploratajn.

**2. Rilatoj kun UEA**

Estraranoj Symoens, Dahlenburg kaj MacGill kunsidis kun la ĝenerala direktoro de UEA kaj la direktoro de la Centra Oficejo, tuj antaŭ la kunsido kaj diskutis komunajn projektojn. Malcolm Jones pretigis tekston por la Jarraporto de UEA. Teksto pri Voss aperis en la Dua Bulteno de Bergen. Aperis en la februara 'Esperanto' okulfrapa alvoko al membriĝo en ILEI kaj partopreno en Voss, rezulte de gazetara komuniko (kiu paranteze rezultis ankaŭ en dissendoj en Radioj Zagreb kaj Varsovio). Laŭ la nova interkonsento, la estraro jarfine submetis al UEA peton por financa disponigo de 3000 gld. por eduka laboro en la kalendara jaro 1991.

ILEI pripensas ĉu proponi al UEA, ke ĝi transdonu al ni la gvidon de la kongresa temo en iu estonta UK. La temo estus sekve eduk-rilata kaj ebligus forfalon de 'Tago de la Lernejo' en tiu jaro. Unu tem-propono estas 'Esperanto – modela interligilo de la kulturoj'.

**3. Financo**

Nia kasisto, Bertil Andreasson, prezentis provizoran kalkulon por 1990. Finversio aperos en IPR2. Nia kapitalo kreskis je ĉ. 10%, sed la jaraj spezoj



post aldono de pliaj eroj ne montras signifan profiton. Tio estas tamen bona, ĉar ĝi entenas kostojn por 5, ne 4 n-roj de IPR. La Koleghelpa Kaso membrigis 17 personojn en 1990. La buĝeto por 1991 ŝajnas en ordo, eĉ post konsidero de novaj eldonprojektoj. Fondaĵo Szerdahelyi tre kontentige evoluas.

**4. Ekzamenoj elementaj kaj mezaj**

En 1990 okazis 9 sesioj en 6 landoj kun 39 kandidatoj el kiuj 35 sukcesis – 18 meze kaj 17 elemente. Pli da detaloj troviĝas en la ĉi-numera jara protokolo. La duono de la Ekzamenaj Gvidiloj estas forvenditaj, sekve necesas baldaŭ okupiĝi ĉu pri nova eldono, ĉu pri alia eldonaĵo kun preparaj ekzercoj.

**5. Supera nivelo**

Venis nur 9 voĉdonoj pri la dissendita regular-propono, 7 por kaj du sindetenoj. Pluraj sekciestroj faris komentojn, kiel ankaŭ alskribitaj potencialaj ekzamenantoj. Deko da tiuj konsentis ofici. En IPR ni resumos la reagojn cele al plia debato. UEA mem ĵus komencis trastudi la tekston kaj volas fari plurajn ŝanĝojn. D-ro Dahlenburg prezentis tekston por la postularo, kiun ni aperigos en IPR. Pro la neceso modifi la regularon ni ne povas antaŭvidi baldaŭan lanĉon de la supera nivelo.

**6. Konferencoj kaj aranĝoj**

'Tago de la Lernejo' estas planita laŭ simila formo kiel pasintjare, t.e. enkonduko pri ILEI kaj la temo 'Konsciigo pri lingvaj problemoj pere de Esperanto-Instruado'. Tiun saman temon ni traktos en Voss kiel la fakan temon, ĉi-numere ni enkondukas ĝin. Sekvos tri prelegoj kun diskut-tempo kaj unu praktika sesio bazita sur la materialo de la 'Lerneja projekto'. Okazos libera podio kun titolo 'La mondo de edukado'. ILEI prizorgos budon (deĵorantoj petataj!) kaj provos starigi ekspozicion de instruiloj pri lingvaj problemoj.

Ĝis nun alvenis ĉ. 30 aliĝoj. Nova komuniko baldaŭ pretiĝos; unu jam dissendiĝis kaj rezultis en informoj plurloke. Historia resumo de ILEI tra 25 jaroj da konferencoj okazos unu-vespere. La Asembleo estas kunvokata por elekti novan estraron kaj trakti novan statut-proponon. Cseh-seminario ne okazos pro manko de aliĝoj, sed demonstro-leciono okazos. Studgrupoj esploros kaj la kadran kaj la fakan temon.

Estontaj konferencoj: por 1992 ni restas esperanta pri konferenco en Ĉeĥoslovakio, spite la transigon de la UK de Prago al Vieno. Se ne eblas, Aŭstrio aŭ Hungario estos esploratajn. Por 1993 ni esperas pri Hispanio kaj 1994 pri Koreio. Malcolm Jones esploras pri ĉiuj el tiuj.

La IMS en Rumanio havos la formon de intensa metodika kurso kun internacia gvidantaro, por maksimume refortigi la instruadon de Esperanto en tiu lando. Ĝi okazos aprile en Odorheiu Secuiesc.

**7. Statuta revizio**

Tio ricevis multan atenton en aparta plurhora kunsido en Roterdamo inter s-roj Hoekstra, Symoens, Dahlenburg kaj MacGill. Signifaj ŝanĝoj estas fari-

taj de la teksto, kiu aperis en IPR 90/4. S-ro Hoekstra prezentos novan tekston surbaze de la diskutoj. Ni distribuos tion al sekcioj antaŭ la konferenco.

**8. Eksteraj rilatoj**

Niaj rilatoj kun UNESKO restas bone prizorgataj de François Lo Jacomo, Ni proponas starigi laborkomisionon sub gvido de s-ro E.Symoens por realigi la planon pri samtempa informado en pedagogiaj medioj kaj instruado de Esperanto. ILEI tenas kontakton kun la Asocio por Natur-dotitaj infanoj tra s-ro R. Glossop el Usono, kiu vizitos Eŭropon baldaŭ kun grupo de studentoj. Ĝia kongreso en Hago bedaŭrinde samtempas kun UK. S-ro Symoens tenas kontakton kun la projekto Erasmus kaj liveris artikolon al ĝi.

**9. Eldonado**

La pedagogia kurs-teksto "Glotodidaktikaj aspektoj..." estas ankoraŭ reviziata de la aŭtoro Mag. Irena Szanser.

Komunika lernolibro de Stefan MacGill estis prezentita; ILEI eldonos ĝian unuan kajeron, eventuale kunlabore kun UEA kaj hungara eldonejo "Tramontana", antaŭvideble en mil ekzempleroj. Ĝi unuavice celas lernantojn de 10- ĝis 14-jaraj kaj nomiĝas 'Tendaraj tagoj'.

Pli ampleksa lernolibro por studentoj "Bonvojaĝo" (18-80-jaraj) estis prezentita de s-ro Paŭlo Gubbins (Britio). Ĝi impresis moderne kaj trafe. ILEI provos eldoni ĝin kunlabore kun alia eldonejo. Lernolibro por afrikanoj de s-ro Emile Van Damme (Belgio) estos eldonita de ILEI nur post konsulto de s-ro Hans Bakker.

**10. Ceteraj temoj**

*Laborkomisionoj:* Aldone al la funkciantaj komisiitoj, s-ro Sossois pri didaktikaj ludoj kaj s-ro Pirlot pri la stato de instruado (kies 8a raporto aperis kaj estas aĉetabla), ni volas starigi laborkomisionon pri informado por funkciigi Edukan Gazetaran Servon (nia aŭstra sekciestro, s-ro Klag, konsentas aktivi en ĝi) kaj alia pri pedagogia terminolgio, pri kiu pluraj membroj jam okupiĝas. Ni kontaktis kelkajn kaj bonvenigas kunlaboremulojn sur ambaŭ terenoj.

La estraro akceptis tekston de kunlabora interkonsento inter ILEI kaj Internacia Esperanto-Instituto en Hago, kiu pli-malpli formaligas la jam funkciantan bonan kunlaboron.

Jen resumo de la ĉefaj temoj ; kompreneble pliaj punktoj estis diskutitaj. La kunsidon salutis kadre de labor-raporto la sola estrarano ne povanta ĉeesti, s-ro Zhang Danchen el Ĉinio.

La estraranoj esprimas refoje profundan dankon al ges-roj Symoens pro la idealaj kunsidaj faciligoj kaj gastamo.

*SMG laŭ la raporto de ES kaj protokolo de MJ.*



JAR-RAPORTO PRI LA INTERNACIAJ EKZAMENOJ DE UEA/ILEI:

# Ekzamenoj atingas kvin kontinentojn

Niaj relanĉitaj ekzamenoj atingas la duan jaron de funkcio; ili ja ne ripetis la kvantan sukceson de la unua jaro, sed ilia internacieco vastiĝas ankoraŭ pli, ĉefe danke al la eblecoj de la kongresoj en Kubo. 1990 portis pli da sesioj ol 1989, sed malpli da kandidatoj. Rimarkinde, ke la du landoj kun la plej granda nombro de sukcesintoj estas ambaŭ ekster-eŭropaj – tendenco, kiu povos ripetiĝi ankaŭ estonte. Ni esperis kroni la jaron per sesio en la unua Afrika kongreseto, tamen tio devos atendi ankoraŭ jaron. La pionira rolo de KCE ne daŭris sam-elane en la lasta jaro, kaj devos dum iom da tempo forfali, sed esperate revenos en 1992. Jen resumo de la sesioj de 1990:

| Sesio | Elementa | Meza | Sukcese | Kontentige | Bone | Tre bone | SUME |
|---|---|---|---|---|---|---|---|
| C-d-F jan (CH) | 0 | 4 | – | 0 | 1 | 3 | 4 |
| C-d-F apr (CH) | 2 | 0 | 2 | – | – | – | 2 |
| Vierhouten (NL) | 1 | 1 | 1 | 1 | 0 | 0 | 2 |
| Kungälv (S) | 4 | 0 | 4 | – | – | – | 4 |
| San-Francisko | 1 | 5 | 1 | 1 | 3 | 1 | 6 |
| Havano (UK) | 2 | 4 | 2 | 1 | 2 | 1 | 6 |
| Hanabanilla (K) | 1 | 1 | 1 | 0 | 0 | 1 | 2 |
| Roterdamo (NL) | 1 | 0 | 1 | – | – | – | 1 |
| Fajana (JU) | 5 | 3 | 5 | 0 | 1 | 2 | 8 |
| SUME 1990 | 17 | 18 | 17 | 3 | 7 | 8 | 35 |

En Nederlando unu kandidato malsukcesis en la antaŭtesto, en San Francisko unu plenumis nur tion, alia malsukcesis en la ekzameno mem, en Jugoslavio unu retiriĝis.Tiuj ne aperas en la supraj kalkuloj.

| FINANCO | Enspezoj | Elspezoj | Por ILEI | (svedaj kronoj) |
|---|---|---|---|---|
| Kungälv | 600,00 | 230,00 | 370,00 | |
| San Francikso | 791,70 | 182,70 | 609 | |
| Havano, UK | 621,18 | | 621,18 | |
| Hanabanilla | 275,80 | | 275,80 | |
| Anonc-serio | | 966,00 | -966,00 | |
| SUME | 2288,68 | 1378,70 | 909,98 | |

La ne-menciitaj sesioj nek kreis kostojn al ILEI, nek liveris enspezojn. Sekve, la ekzamen-sesioj estas nete iomete profit-donaj por ILEI (ĉefe pro tiuj kazoj, kiam la ekzamenantoj postulas neniujn kostojn kaj la sesioj okazas en 'riĉaj' landoj – iusence la UK estas riĉa, kie ajn ĝi okazas). Tamen, la ekzamenoj kiel entute estas certe deficitaj, ĉar ne enkalkulitaj estas la kostoj de testo-verkado, korespondado, antaŭsesia foto-kopiado, komputil-uzo ktp., kiuj aperas en la ILEI-buĝeto sub rubrikoj 'afranko, presado, honorarioj ktp.'

## EKZAMENOJ TRA 1989 KAJ 1990

| JARO | Sesioj | Elem | Meza | SUME | Landoj | Kontinentoj |
|---|---|---|---|---|---|---|
| 1989 | 7 | 14 | 35 | 49 | 15 | 4 |
| 1990 | 9 | 17 | 18 | 35 | 15 | 4 |
| **SUME** | **16** | **31** | **53** | **84** | **21** | **5** |

| Laulande: | 1989 | 1990 | SUME |
|---|---|---|---|
| Ĉinio | 14 | 0 | 14 |
| Usono | 8 | 4 | 12 |
| Svedio | 3 | 5 | 8 |
| Francio | 5 | 3 | 8 |
| Nederlando | 3 | 3 | 6 |
| Jugoslavio | 2 | 4 | 6 |
| Kanado | 2 | 3 | 5 |
| Italio | 1 | 3 | 4 |
| Svislando | 3 | 1 | 4 |
| Germanio | 2 | 1 | 3 |
| Belgio | 2 | 0 | 2 |
| Hispanio | 0 | 2 | 2 |
| Meksikio | 0 | 2 | 2 |
| Brazilo | 1 | 0 | 1 |
| Irlando | 1 | 0 | 1 |
| Norvegio | 1 | 0 | 1 |
| Ruando | 1 | 0 | 1 |
| Alĝerio/Svisl | 0 | 1 | 1 |
| Ĉilio | 0 | 1 | 1 |
| Nov-Zelando | 0 | 1 | 1 |
| Malagasa DR | 0 | 1 | 1 |
| **21 landoj** | **49** | **35** | **84** |

# INTERNACIAJ EKZAMENOJ de UEA/ILEI

La ĝustaj solvoj de la kvizo pri la rolo de la angla lingvo estas
1C, 2C, 3A, 4C, 5B aŭ C, 6A, 7A, 8C.




## Ĝeneralaj scioj

**Jen alispeca ekzameno en Esperanto sed ne nepre pri ĝi — testo de viaj scioj pri plej diversaj temoj — geografio, historio, scienco, filmoj, sed ankaŭ pri la Esperanta kulturo, movado kaj literaturo. Ĉi tiu 36-paĝa libreto starigas al vi 304 demandojn en 20 testoj; necesas elekti la ĝustan respondon el kvar proponoj.**

**La libreton eldonis ILS, International Language School, ne-movada instanco en Budapeŝto, kadre de 6-lingva serio en kiu jam 40 testlibroj aperis. La testoj estas ĉe ili ankaŭ komputile fareblaj. Librofine troviĝas la ĝustaj respondoj.**

**Taŭga por esperantistoj ĉiuaĝaj, sed precipe por lernejanoj ekde 12-jaraj. Mendu ĉe UEA, 6,60 gld. aŭ ĉe aliaj libroservoj.**



Ni devas antaŭvidi malpli bonan financan rezulton en 1991, ĉar krom la sesioj en Norvegio, Grésillon kaj Szombathely/Graz, ĉiuj estas antaŭvidataj en netranspagipovaj landoj.

### EKZAMENANTOJ RAJTIGITAJ

Rezulte de spertoj el 1990, IEK konsentis larĝigi la reton de ekzamenantoj, aldonante Katalin Smideliusz (H), Ivo Borovecki, Antun Simunic (JU), Rob Moerbeek (NL), Privas Tchipke (Benino), Gbeglo Koffi, M. Agbemadon-Attiogbe (Togolando), Carla de Lorenzi (Italio).

### SESIOJ POR 1991

Sesioj de la Internaciaj ekzamenoj de UEA/ILEI je la elementa kaj meza niveloj estas planataj en Odorheiu Secuiesc, Rumanio, dum la 9a IMS (7-12 apr.), en Kastelo Grésillon (kun kurso, 27apr.- 4 majo), dum la UK en Bergen, eble dum la ILEI-konferenco en Voss tuj poste, en Ĉinio dufoje (maje en Wuhan), en Bulgario (dum la somera universitato en Veliko Tirnovo kaj aŭtune en Pisanica), en Jugoslavio apudmare en aŭgusto kaj en Subotica tuj antaŭ la nacia kongreso fine de aŭgusto kaj jarfine en la 2a Afrika Kongreseto. Venis propono iam aranĝi sesion por Graz-anoj, eble en la land-lima hungara urbo Szombathely, kie grupo de trejnataj instruistoj ankaŭ interesiĝas. Aliaj sesioj estas aranĝeblaj laŭbezone. Kiu deziras ekzameniĝi bv. kontakti la enlandan instancon aŭ la sekretarion de IEK: Stefan MacGill, Esö u. 7 III, H-1034 Budapeŝto, Hungario.

### NOVA SEKRETARIO SERĈATA

Kvankam multo el la administra laboro pri dissendo de testoj, tenado de rilatoj kun ekzamenantoj kaj eĉ verkado de testoj estas nun en la manoj de komisiito, la sekretario de IEK anoncas sian deziron retiriĝi el la ofico pro tro da aliaj taskoj en kaj ekster ILEI. Ni sekve serĉas kandidaton por la ofico, kies ĉefaj taskoj estas:

- certigi akuratan liveron de testoj, atestiloj kaj gvidiloj.
- prizorg(ig)i verkadon de novaj testoj sufiĉaj por la bezonoj.
- ricevi kaj teni precizan protokolon de ĉiu sesio.
- prezenti ĉiujare al UEA kaj ILEI jaran protokolon kaj financan rezulton.
- ellabori kriteriojn kaj gvidilojn por ekzamenantoj
- prizorg(ig)i publikecon pri la eblecoj kaj kondiĉoj de ekzamenado.
- kunlabori kun sekcioj, asocioj kaj centroj por vastigi la nombron de ekzamenaj sesioj kaj preparaj kursoj.
- prepar(ig)i pli da ekzerco-materialo por helpi kandidatojn pretigi sin.
- esplori eblecojn akiri oficialan agnoskon de la ekzamenoj en ekster-movadaj rondoj.

En tiu taskaro, la sekretario havas la apogon de la ceteraj membroj de IEK kaj de IRE kaj de pliaj komisiitoj. La sekretario de IEK ne devos okupiĝi pri la formata supera nivelo de la ekzamenoj. Interesiĝantoj bv. turni vin al la prezidanto de IEK, d-ro Till Dahlenburg (adreso kovrile).

Ne forgesu, ke la regularo, postularo kaj celaro de la ekzamenoj jam aperis en 'Gvidilo al la internaciaj ekzamenoj de UEA/ILEI' (1989). Tiu modesta 36-paĝa gvidilo, entenanta du specimenajn ekzamenojn, staris inter la 20 plej vendataj libroj de 1990 ĉe UEA.

Mendu ĝin ĉe UEA (6,60 gld.) aŭ ĉe ILEI\FEL, Frankrijklei 140, B-2000 Antwerpen, Belgio (120 BEF) aŭ ĉe via libroservo.

*Stefan MacGill. Sekretario IEK.*

**Protokolo: internaciaj ekzamenoj de UEA/ILEI, 1990**

*Elementa ekzameno (17 personoj el 11 landoj)*

| | | |
|---|---|---|
| Francio, St. Projet dS | LANIER, Guillaume | KCE, apr. |
| Germanio, Hannover | KUHR, Heide | UK, julio. |
| Hispanio, Vitoria-G | GAUNA, Inaki | UK, julio. |
| Italio, Gorizia | GENOVESE, Sera | Faĵana, aŭg. |
| Italio | NIGRELLI, Paola | Faĵana, aŭg. |
| Jugoslavio | ESES, Tihomir | Faĵana, aŭg. |
| Jugoslavio | HITREC, Vesna | Faĵana, aŭg. |
| Jugoslavio | PUFNIK, Neven | Faĵana, aŭg. |
| Malagasa DR | RANDRIANARIVELO, Bruno | Roterdamo, aŭg. |
| Nederlando, Amsterdam | KEETLAER, Rob | Vierhouten, apr. |
| Nov-Zelando, Wellington | SUTTON,Gwenda | Hanabanilla, jul. |
| Svedio, Lyungby | ELLARD, Dag | Kungalv, junio. |
| Svedio, Upplands Vasby | HANSEN, Ole | Kungalv, junio. |
| Svedio, Svedala | PERSSON, Kjell | Kungalv, junio. |
| Svedio, Goteborg | LESSLER, Barbro | Kungalv, junio. |
| Svislando, Basel | BEROUD-FOCKE, Nicole | KCE, apr. |
| Usono, Reno | NELSON, Chris | San Francisko, jul. |

*Meza ekzameno (18 personoj el 11 landoj)*

| | | |
|---|---|---|
| Ĉilio, Santiago | ZANELLI, Daniel | UK, julio. |
| Francio, Metz | DE ZILAH, Madeleine | KCE, jan. |
| Francio, Sartrouville | CLABAUT, Robert-A | KCE, jan. |
| Germanio | WALPER, Sven | Faĵana, aŭg. |
| Hispanio, Alicante | EGEA, Jose M. B. | UK, julio. |
| Italio | PERNA, Alessandro | Faĵana, aŭg. |
| Jugoslavio, Zagreb | JAGNJIC, Ankica | Faĵ ana, aŭg. |
| Kanado, Sicamous | GREEN, J. | KCE, jan. |
| Kanado, Nanaimo | SMYTHE, Jean | San Francisko, jul. |
| Kanado, Lantzville | SHEPPARD, Erna | San Francisko, jul. |
| Meksikio, Durango | CORRALES, José e J. | UK, julio. |
| Meksikio, La Paz | SOTO, Juan J. S. | UK, julio. |
| Nederlando, Nijmegen | RHEBERGEN, Martin | Vierhouten, apr. |
| Nederlando, Beverwijk | MOERBEEK-BARTELS, Nora | Hanabanilla, jul. |
| Svislando, La Chaux-de-Fonds | FRIH, Hamid | KCE, jan. |
| Usono, Reno | SERA, Natalie | San Francisko, jul. |
| Usono, San Marcas | EVANS, Darlene | San Francisko, jul. |
| Usono, Eugene | TIKKER, Timothy | San Francisko, jul. |



# NIAJ SEKCIOJ KAJ MEMBROJ AKTIVAS

**Ni volas fortigi la ligon inter la centra ILEI kaj la sekcioj. Tra IPR ni povos intensigi la fluon de informoj inter sekcioj. Cele al tio ni volas regule aperigi ĉi tiun rubrikon ekde nun. Sekcioj bv. sendi informojn regule – unufoje jare ni petas kompletan raporton, sed certe ĉiun trian monaton oni povas kontribui almenaŭ kelkajn liniojn pri la lastatempa laboro aŭ venonta evento.**

**Se mankas tempo verki artikoleton, ĉiu sekcio bonvolu ekde nun regule sendi al la redakcio de IPR sian bultenon aŭ organizan cirkuleron. Eventuale marĝene indiku la plej interesajn informojn; nia redakcio verkos teskton laŭ tio. Pluraj sekcioj eldonadas bultenojn, sed IPR neniam vidas ilin! Ni sendas al ĉiu sekcio plurajn ekstrajn ekzemplerojn de IPR, bv. konsideri ilin interŝanĝaj al min. 2 ekz. de via bulteno; unu atingu la estraron de ILEI, la alia la redakcion. Dankon!**

**AŬSTRIO:** 'Esperanto wird Weltweit Unterrichtet' (Esperanto estas mondvaste instruata) estas la titolo de germanlingva informilo eldonita de nia sekciestro, surbaze de la informoj de la 8a eldono de 'Oficiala situacio de la E-instruado en la Mondo' de nia komisiito s-ro G. Pirlot kaj de aktualaj informoj pri la E-fako en Budapeŝto de dr-ino I. Koutny, aperintaj en la cirkulero de nia germana sekcio. Tion oni distribuas inter instruistoj, kune kun pli ĝenerala profesi-aspekta prospekto.

• En januaro la ekspozicio 'Expolingua 1991' vizitis Vienon, nia sekciestro tie prizorgis budon kie oni ofertis rapid-kursetojn, kunlabore kun s-ino Katalin Smideliusz el la nemalproksima sed eksterlanda Szombathely; tia internacieco portas etosan pluson al tiaj informaj agadoj.

**BELGIO:** Sub la titolo 'Novaj ludoj' oni en Namur kuraĝigas esperantistojn partopreni aktive en ne-infanecaj ludoj, sed tiaj, kiuj evoluigas niajn komunik-kapablojn kaj homajn rilatojn. Tiuj do ne estas ŝablonaj ludoj, en kiuj devas esti unu gajnanto kaj pluraj malgajnantoj. La iniciatinto organizos kunludantojn en grupojn de 5 ĝis 50. El la ricevita informilo ne estas tute certe, kiel funkcias ĉio: interesatoj bv. peti pli da informoj de Gilen Tilleux-Craenhals, Les Hauts de Meuse, 4, B-5101 Erpent (Namur), Belgio: tel. (081) 30 39 20.

**ĈEĤOSLOVAKIO:** La E-klubo en Senica (Slovakio) organizos de la 21 ĝis la 27a de julio paroligan semajnon. Informoj: Anna Hornáková, Hviezdoslavova 313/19, CS-905 01 Senica. Samurbe fine de 1991 okazos publika ekspozicio de Esperantaj gazetoj, jam la kvara depost 1988. Bv. sendi gazetojn, informilojn ks. al: Esperanto-klubo, domo de kulturo, CS-905 01 Senica.

**ESTONIO:** Februare la vic-prezidanto de UEA, s-ro Roman Dobrzynski, vizitis Tallinn por fari filmon por la pola televido. Li filmis la oficialan E-klason de nia sekciestro, s-ro Johannes Palu, kiu parolis en la programo, kiel ankaŭ lernantoj Janika Sirvi kaj Toomas Kauber.

**FRANCIO:** De la 25a de majo ĝis la 2a de junio okazos Esperanto-staĝo en Ariege-Pireneoj, kun instruistoj el Italio kaj Bulgario. Informoj de Jorgos, F-09120 Saint-Felix-de-Rieutort.

• 15a internacia semajno ĉe alpoj, 24-31 aŭg, 1991 kaj sama ĉe mediteraneo 7-15 sept, 1991. Serioza trinivela instruado en bona etoso ambaŭloke: Habere-Poche kaj Sete. Ekskursoj kaj kultura programo. Loĝigo inter 1000 kaj 1250 FF por la semajno. Informojn: Esperanto, 5 rue du Docteur Roux, F-34000 Montpellier, Francio.

**JUGOSLAVIO:** 'Ilustru ni kune' estas la titolo de internacia konkurso de infan-desegnaĵoj anoncita de la Esperanto-Societo de Subotica, kunlabore kun ĉokolada entrepreno PIONIR, memore al konata samurbano Tibor Sekelj. Rajtas partopreni infanoj naskiĝintaj en 1976 aŭ pli junaj. Necesas fari desegnaĵon por ilustri la libron de Tibor Sekelj 'Kumeŭaŭa, filo de la ĝangalo'. Formato kaj tehniko liberaj. Limdato: 31a de aŭgusto 1991 ĉe Esperanto, Internacia konkurso, Trg Slobode 1, YU-24000 Subotica, Jugoslavio. La premioj estas 150, 100 kaj 50 dolaroj (aŭ egalvaloro en la valuto de la gajnintoj) kaj diplomoj. La verkoj estos ekspoziciataj en la 23a kongreso de JEL.

• Laŭ similaj kondiĉoj okazas literaturaj konkursoj, unu por originala prozo\poezio, unu por tradukita. Premioj en ambaŭ kategorioj 200, 100 kaj 50 germanaj markoj. Prozo ĝis 10 paĝoj, poemoj ĝis cent versoj. Sendu kvarekzemplere kun kaŝnomo. Aĝlimo ne estas. Supra adreso por pli da informoj.

**NEDERLANDO:** Nia sekcio NGGE organizis sukcesan stud-semajnfinon en 1990, dua planita ne okazis. NGGE kunlaboras kun la fondaĵo 'Esperanto en Edukado', kiu eldonis nederland-lingvan prospekton, kaj kies membro s-ro Makkink proponis raporton pri lingvo-instruado al la konstanta registara komisiono pri instruado. El 60 membroj, 40 respondis enketilon de NGGE, el ili 18 instruas Esperanton al sume ĉ. 180 infanoj, sed neniuj en oficialaj lernejaj klasoj.

**NORD-AMERIKO:** Ne estas ĝenerale konsciata, ke nia nordamerika sekcio, AAIE, estas ne nur nia plej granda, sed inter la plej aktivaj. Tion atestas la sekva raporto de ĝia prezidanto, Ian Richmond, kiu nur ĵus atingis la redakcion:

*Informado kaj varbado*

Speciala sesio pri Esperanto en la 7a Monda Kongreso pri Internacia Edukado, Montrealo, junio 89. Organizis d-ro Marianne Lee (Universitato de Sud-Kalifornio).

Speciala sesio pri Esperanto en la Jarkongreso de la Amerika Asocio pri Modernaj Lingvoj, Ĉikago, dec. 89. Organizis d-ro Frank Nuessel (Universitato de Louisville).

*Prelegoj en pedagogiaj medioj*

D-ro Lee: 'La apartigo de lingvo kaj kulturo' en la 7a Monda Kongreso de Kompara Edukado. Junio 89 al diversnivelaj pedagogoj.



D-ro Lee: 'Edukado por la nuklea epoko' en 'Edukistoj por socia respondeco.'

D-ro Lee: 'Kiel inkluzivi universalajn temojn en nukle-epoka scienco kaj sociaj studoj' al universitataj profesoroj en la Amerika Eduka Esplor-Asocio.

D-ro Ian M. Richmond (Universitato de Okcidenta Ontario) 'Esperanto kaj Literatura Esploro' al universitataj profesoroj kadre de la Jarkonferenco de la Modern-Lingva Asocio de Ameriko en Vaŝintono en decembro 1989.

D-ro Richmond, 'Esperanto: ilo por internacia edukado' en la 7a Monda Kongreso pri Kompara Eduko, Montrealo, junio 1989.

D-ro Humphrey Tonkin (Universitato de Hartford), 'Lingvistika esploro: tagordo por la naŭdekoj', Jarkonferenco de MLA, Vaŝintono, dec. 89.

• Rigardante estonte, de la 1a ĝis la 19a de julio 1991 okazos jam la 22a sesio de la someraj kursoj en la Ŝtata Universitato de San-Francisko. Ĉi-jare oni ofertos kvar kursojn: ESP594 Bonvenon al Esperanto, ESP595 Akiranta memfidon en Esperanto, ESP596 Esperanto en praktiko – lingvo kaj literaturo, ESP597 Esperanta literaturo, lingvo kaj kulturo kaj ESP699 Direktitaj studoj en Esperanto. Tiuj kursoj valoras po tri unuojn en la universitata skemo kaj estas kombineblaj kun aliaj studoj por akiri universitatan diplomon. Pedagogia kromkurso valoras plian unuon. Ĉi-jare instruos d-roj James Cool de la kolegio Wilmington (Ohio), prof. Michel Duc Goninaz de la universitato de Provence en Francio kaj prof. So Gil Su de la universitato Kuk-Jae el Koreio. Meze 6 horoj da instruado tage, loĝigo kaj manĝado en la universitata tereno mem, kulturaj kaj distraj programoj aldone – entute unu el la plej intensaj kaj memorindaj E-kursoj oferĥata ie ajn en la mondo. Informoj pri kursoj, stipendioj, loĝigo kaj aliĝo: Cathy Schulze, 410 Darrell Road, Hillsborough, CA 94010; tel. (415) 342-1796.

Sendu nun informojn pri via sekcio aŭ via iniciato por ĉi tiu rubriko en la venonta numero de IPR!

**ENKETO AL SEKCIOJ 1990:** Ni pardonpetas, ke la informoj el tiu enketo neniam aperis; ili simple ne atingis la redakcion. Ĉar tiom malfruas, ni nur tre skize resumas ilin:

*Argentino:* 8 membroj, 5 instruistoj, memstara, sen bulteno.

*Aŭstrio:* 15 memb, 14 inst., memstara, sen bulteno, kursoj en popol-altlernejoj en Vieno kaj Graz, aperigis artikolojn en pedagogiaj revuoj. Belgio: 18 membroj, 9 instruistoj, memstara, sen bulteno.

*Brazilo:* 30, 15, ne memstara. Anonco de kursoj per afiŝoj en metrostacioj, fulm-kursoj, abono al IPR donace por la plej elstaraj studentoj.

*Britio:* 103 memb., plimulto instruistoj. Memstara. Bulteno 'The Esperanto Teacher'. Flugfolioj, partopreno en ekspozicioj, gazetara servo.

*Ĉeĥio*: 5,3. fako de LA de UEA. Prelego en Universitato de Brno, gazetanoncoj pri korespondaj kursoj.

*Ĉinio:* 16,9, memstara kun bulteno. Artikoloj en revuo de Ŝanhaja Fremdlingva Instituto, prelegoj en diversaj universitatoj.

*Estonio:* 32,28, memstara. Kursoj en 15 lernejoj, 200 lernantoj. 6 artikoloj en estona instruista gazeto. Oficiala kurso por instruistoj.

*Finnlando:* 37,29, memstara. Du radio-elsendoj pri E-instruado. somera E-kurso, kontaktoj kun Univ. de Helsinki pri kurs-starigo.

*Germana DR:* 6,4, fako de LA de UEA. Eldono de dulingva konversacia libro kaj 5a eldono de lernolibro.

*Nederlando:* 56,18. Memstara kun bulteno 'NGGE sciigas'.

*Nordameriko:* 88, 32. Memstara kun 'AAIE-bulteno'. (vidu supre!)

*Svedio:* 58, 39. Memstara.

*Zairio:* 22, 22, Fako de la LA de UEA.

Informojn kompilis\redaktis Stefan MacGill

## Finaj vortetoj

Ĉi tiun numeron de IPR ni fermas en la 4a de aprilo post multe da malfacilaĵoj. Kelkaj longaj tekstoj superregas, pri tiu de Strobl Katalin oni ĝoju pro ĝia kvalito, pri la dekjara indekso ĝoju, ke similan oni ne devos digesti ĝis la jaro 2001. La konferencajn temojn ni bunte kaj demando-svarme malfermis, krom tio oficialaĵoj iom pezis. Ege multo devis transiri al estontaj numeroj, al la koncernatoj ni pardonpetas. Almenaŭ sukcesas la strebo fermi la numeron ĵus antaŭ ekiro profunde en Rumanion por la 9a Internacia Metodika Seminario, kiu espereble markas turn-punkton tie en la rekono de Esperanto kaj ĝia instruado. Raporton vi legos kun ĉio cetera en la venonta numero.

smg

# Fondaĵo Szerdahelyi

**Honorato:** La eminenta hungara pedagogo kaj verkisto, fondinto de la Esperanto-katedro en la universitato ELTE en Budapeŝto, prezidanto de ILEI de 1985 ĝis 1987.

**Celoj:** Permesi al ILEI entrepreni pli ambiciajn projektojn pri i.a. eldonado, pedagogia terminologio, instruista trejnado, esplorado pri lingvo-didaktiko kaj okazigo de kursoj kaj ekzamenoj.

**Ĝirkontoj:** Pĝk. 6821177 (Stockholm) nome de ILEI, Södra rörum pl. 455, S-242 94 Hörby. Aŭ al UEA, pĝk 378964 Nederlando aŭ UEA, pĝk 318291-509 Köln BLZ 370 100 50, por la interna konto ilek-a de ILEI. Atentu la novajn kostojn por internacia ĝirado; ĝuste plenumita Eŭroĉeko evitas tiujn novajn subtrahojn.

| | |
|---|---|
| Sumo en svedaj kronoj je oktobro 1990: | 15.101:57 |
| Vojaĝanto | 100:00 |
| Bankokostoj 1990 | - 80:00 |
| Rento por 1990 | 319:80 |
| SUMO FINE DE 1990 | 15.441:37 |
| 'Omaĝe al Audrey Childs-Mee' (anonime) | 1.075:13 |
| Sumo fine de januaro 1991: | 16.516:50 |

**Al la donacintoj ni tre kore dankas!**



### HONORAJ MEMBROJ

Peter Zlatnar (YU, 1984) – Mario Dazzini (I, 1985) – Erbetta Marcel (CH, 1986)
Irja Klemola (SF, 1986) – Olle Olsson (S, 1986) – Jozef Toczyński (PL, 1986)
Helmut Sonnabend (D, 1987) – Catina Dazzini (I, 1988) – Szerdahelyi István (H, 1988)
M.H. Saheb-Zamani (IR, 1989)

### SEKCIESTROJ DE LA LIGO

**Argentino** : Herminia Kirkerup de Fernandez (s-ino), Calle Cerrito 1.249, Barrio San Martín, RA-5000 Córdoba, (Córdoba)
**Aŭstrio** : Mag. Walter Klag, Rudolfinergasse 8/11, A-1190 Wien
**Belgio** : Marc Demonty, Schoolstraat 3, B-1700 Dilbeek
**Brazilo** : Elvira Fontes, Rua Machado de Assis 243, ap. 11, BR-04106 São Paulo SP
**Britio** : Arnold Pitt, Yew Tree Cottage, Ivington Road, Leominster, Herefordshire HR6 82D
**Bulgario** : Ivanka Spasova, j.k. Lenin bl. 20, vh. 3, BG-1124 Sofia
**Ĉeĥio** : Vêra Barandovska, Volgogradská 41, CS-70400 Ostrava 3
**Ĉinio** : Zhang Danchen, General Foreign Languages Dept., Huazhong Normal University, 430070 Wuhan, PR China
**Estonio** : Eve Otsa, Liivalaia 30-12, EST-200001 Tallinn, Estonio
**Finnlando** : Synnöve Mynttinen, Keskussairaalankatu 5 M 133, SF-15850 Lahti
**Francio** : Claude Nourmont-Moon, 2 Om Kläppchen, L-5682 Dalheim
**F.R. Germanio** : Stefanie Tucker, Alatseestr. 14, D-W-8900 Augsburg
: Till-Dietrich Dahlenburg, Feldstr. 13, D-O-2722 Brüel
**Hispanio** : Manuel López Hernández, Poŝtkesto 832, E-41080 Sevilla
**Hungario:** : Márta Kovács, Ady E. u. 23-25/C, H-1221 Budapest
**Israelo** : Murĵan Josef, P.K. 1289, IL-61012 Tel-Aviv
**Italio** : Catina Dazzini, C.P. 22, I-54100 Massa
**Japanio** : Toi Kunio, 1448-1 Simotakajyanagi, Kazo-si, Saitama 347
**Jugoslavio** : Sonja Tavčar, Liminijanska 6, YU-66320 Porotorož
**Korea Resp.** : Gilsu So, Sodaemun, P.K. 59, Seoul-120
**Nederlando** : D. Luesken-Burger, Renderklippenweg 5, NL-8162 NC Epe
**Nordameriko** : Doroteo Holland-Kaupp, 5140 San Lorenzo Dr., Santa Barbara, CA 93111-2521, Usono
**Norvegio** : Åge Melå, Beverstien 2, N-3190 Horten
**Pollando** : *Vakas*
**Portugalio** : Alexandre Kasesa, Rua Actriz Palmira Bastos 10, 4'B, P-1900 Lisboa
**Sanmarino** : Marina Michelotti, Contrada del Collegio 51, I-43031 San Marino
**Slovakio** : Anton Zachariáš, Sobotské námestie 6, CS-05801 Poprad
**Sud-Afriko** : Japie Spoelstra, Posbus 20185, Noordbrug 2522, Suid-Afrika
**Svedio** : Bertil Andreasson, Södra Rörum pl. 455, S-24294 Hörby
**Svislando** : Edgar Jobin, F.W. Dubois 11, CH-2400 Le Locle
**Venezuelo** : Inĝ. Felix Garcia Blasquez, Apartado 75.090, YV-1070 A Caracas
**Zairio** : Ngangu Nduantoni-Bakidila, B.P. 13, Lukala (Bas-Zaïre)

BERNBURGA ESPERANTO - RENKONTIĜO - BER'91 -
sabate la 25an de majo 1991
- - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - -

P R O G R A M O

horo

10a
- malfermo kaj salutparoloj
- prelego pri la urba historio
- diskuto pri la estonta laboro

12a pauzo por tagmanĝo

13a 30 rigardado de urbo kaj kastelo

14a 30 ŝipekskurso ( ĉa. 3 horoj )

La aranĝo estas senpage.

Ĉiu pagas mem por trinkaĵoj, manĝoj, la ŝipekskurson k.t.p.

## REPREZENTANTOJ

**Bangladeŝo** : Sultan Ahamad, Factory Inspection Dept., 4 D.I.T. Avenue, Dhaka-1000
**Centrafrika Resp.** : Luc Feidangai, B.P.960, Bangui
**Ĉilio** : Luis A. Vera, Isabel Riquelme 7115, Pobl. C. Estrella, La Cisterna, Santiago
**Hindio** : Abani Halter, Jamboni, P.O.Bolpur 731204, W. Bengal
**Irano** : Mohammad Karamudini, P.O.Box 13445-747, Tehran/Iran
**Niĝerio** : Godwin Oboh, University of Ekpoma Wan, Illeh Box 62, Ekpoma Bendel
**Tanzanio** : Mramba Simba, S.L.P. 1051, Bunda Mara

## LABORKOMISIONOJ

**Statistiko** : Germain Pirlot, Steenbakkersstraat 21, B-8400 Oostende Tel. (059) 70.87.00

**Didaktikaj lud(il)oj** : Georges Sossois, rue du Basson 79, B-6001 Marcinelle Tel. (071) 43.62.05

## KUNLABORANTAJ INSTITUCIOJ

**UNESKO** : (Rilatoj de reciproka informado, Kategorio C)
: 7 Place Fontenoy, F-75007 Paris.
Reprezentantoj de ILEI:
James Fairbank, 6 Avenue Th. Rousseau, F-75016 Paris
François Lo Jacomo, 21 rue Juliette Dodu, F-75010 Paris

**UEA** : Universala Esperanto-Asocio, Nieuwe Binnenweg 176, NL-3015 BJ Rotterdam

**IEI** : Internacia Esperanto-Instituto, Riouwstraat 172, NL-2585 HW Den Haag

**KCE** : Kultura Centro Esperantista, BP 779, CH-2301 La Chaux-de-Fonds

## Kontribuaĵoj al IPR

tajpitaj kun duobla interspaco kaj marĝenoj, al la adreso de la Redaktejo (vd. kovrilpaĝon)

## Abonado al IPR kaj membriĝo al ILEI:

(membrokotizo 50 Svedaj Kronoj)

1) poŝtĝirkonto: 682117-7 (Stockholm). «La Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj» (ILEI). Södra Rörum pl. 455, S-242 94 Hörby (Svedio).
2) poŝtĝirkonto: 3789 64 de UEA, Nieuwe Binnenweg 176, NL-3015 BJ Rotterdam (Nederlando), por la interna konto ILEK-A de ILEI.